



MARTINUS  
INSTITUT

# Kosmos


LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

La 70-jariĝa parolado  
de Martinus

**Hokan Lundberg**  
Kiel prepariĝi por la  
estonteco?

Resumo de simbolo  
n-ro 23

Resumo de simbolo  
n-ro 19



© Martinus Institut 1981

Reg. 23

*La preta homo laŭ la bildo de Dio simila al li*

Kara leganto, verŝajne vi ĝenerale estas “esper-ant-o” kiu esperas je pli bona mondo kaj pli paca mondo en la estonteco. Tamen kelkfoje facilas esti ankaŭ “mal-esper-ant-o” vidante kio okazas en la mondo kaj kiel la “grandaj politikistoj” agas kaj kondutas. Nature aperas demandoj kiel: *Kien iras la mondo? Ĉu vere la homaro evoluas ĝustadirekten kaj faras paŝojn antaŭen?*

Sveda profesoro, kiu ĵus forlasis la fizikan mondon, Hans Rosling ellaboris manieron grafike ilustrati datumojn kiuj klare montras ke la vivkondiĉoj por homoj multe evoluas dum la lastaj jardekoj en preskaŭ ĉiuj landoj, aparte en la malriĉaj. Sed tie kie estas longdaŭra milito la situacio kompreneble estas alia. Militoj kaj konfliktoj malhelpas al plibonigoj mallong-perspektive, sed el tre longa perspektivo ili fakte multe helpas al la homaro evolui, laŭ la analizoj de Martinus. Tiel estas pro tio ke homoj kiuj multe suferas en milito iĝos pacifistoj en siaj venontaj enkarniĝoj.

Martinus klarigas ke ni povas esti tute trankvilaj kaj plene fidi ke ĈIO estas en ordo kaj ke ĈIO okazas laŭplane! Tio povas soni tre strange ... Kiel milito povas esti en ordo?! Kiel la malsatego kaj naturkatastrofoj povas okazi laŭplane?! Kiel ni povas fidi ke la ĝustaj politikistoj havas la potencon, aŭdante la nunajn mondgvizantojn?!

Per studado de la kosmaj analizoj de Martinus eblas, almenaŭ teorie, kompreni ke milito, el plurviva vidpunkto, fakte alportas ion bonan. Laŭ Martinus la militoj mortigos sin mem pro tio ke ĉiuj homoj surteraj finfine treege lacos je ajnaj konfliktoj kaj aparte je militoj. Kiam granda plejmulto de la


homaro absolute ne volas teni armilon aŭ partopreni en milito, tiam venos vera mondpaco kaj internacia harmonio por la homaro. Sed tiu “satiĝo” de konfliktoj kaj militoj povas aperi en ni homoj nur per tio ke ni mem partoprenas en diversaj konfliktoj kaj ke ni spertas la konsekvencojn de ili!

Por iĝi “paco-geniuo” ni ĉiuj devas lerni la diferencon inter “bono” kaj “malbono” – ne nur teorie sed vere konkrete en nia propra vivo kaj ĉiutago dum multaj enkarniĝoj. Fine de tiu ĉi plurviva lernado povas esti tre granda helpo studi la analizojn de Martinus. Ili klare montras ke la estonteco estos tre luma kaj ege agrabla por ni ĉiuj. Sed ne estos facile, certe doloros plurfoje kaj ni denove suferos diversmaniere. Ĝuste dank’ al tio ni iĝos pli kaj pli humanaj, pli kaj pli pacemaj, pli kaj pli humilaj ktp. Iom post iom ni sukcesos ŝanĝi nian kondukmanieron por ke ĝi iĝu tute harmonia, luma, pozitiva kaj ama. Tiel ni, paŝon post paŝo, kreas pacon en ni mem, sendepende de kio okazas en la cetera mondo. Krei “pacon en si mem” estu la ĉefa celo de nia vivo se ni volas ke nia estonteco estu longdaŭre luma laŭeble rapide.

Certe ne eblas tuj atingi plenan pacostaton. Ni devas multe ekzerci nin kaj kompreneble plurfoje malsukcesos, tiel estas kiam oni lernas ion novan! Espereble tiu ĉi numero de Esperanto-Kosmos donos al vi inspiron plu ŝanĝi vian kondukmanieron kaj ankaŭ iom da teoria kompreno pri kial indegas strebi al tia ŝanĝiĝo. Agrablan legadon kaj paco-ekzercadon!

*Hokan Lundberg*

# La 70-jariĝa parolado de Martinus



M1500

## 1. La gloro por la kosmaj analizoj apartenas sole al Dio

Miaj karaj amikoj! – Mi ĉi tie volas esprimi vere koran dankon al vi pro la granda amo kaj simpatio, kiujn vi hodiaŭ alportis al mi. Mi ne vere vidas, ke mi estas aparte merita je tia omaĝo. Mi ja havis la grandan ĝojon, ke la Providenco lasis min labori pri tio, kio estas mia plej granda ĝojo. Estas kiel labori pri sia ŝatokupo. Tio, kion mi donis al vi, ne estas nur mia, sed ja estas tio, kion Dio donis al mi. Pro tio la gloro por ĉi tiuj kosmaj analizoj ne apartenas al mi, sed sole al Dio. – Kaj mi ankaŭ volas danki vin, pro tio ke vi dum multaj jaroj subtenis mian mision kaj partoprenis en ĝi, tiel ke ĝi povis kreski kaj, pro miaj kosmaj analizoj, povis fariĝi ĝojo por homoj tra la tuta mondo.

## 2. De la epoko de la mallumo ĝis la epoko de la lumo

Kiun signifon do havas ĉi tiuj kosmaj analizoj? – Por kompreni tion, oni rigardu la nuntempan homaron. La homoj ja troviĝas en malluma epoko, en la vintrozono de la spiralciklo, kaj pro tiu mallumo ili troviĝas en la militepoko, kiun mi nomas la juĝotago aŭ Ragnaroko. Ĝi estas la plej mortiga epoko en la tuta historio de la homaro. Sed mi ankaŭ povas informi vin, ke estas io luma pri tio, pro tio ke ni troviĝas ĝuste en tiu regiono, en kiu la homaro transiras de la mallumepoko al la epoko de lumo. Tiu ĉi lumepoko estas tute nova regno. La homaro iam ja unuiĝas en

unu grandan regnon, en kiu estas nur unu registaro, unu ŝtato ktp. La mondo estos regata de inicitaj estuloj, kaj tiu ĉi pure materia flanko de la lumregno estos realigita post 3000 jaroj. Sed tiu ĉi venonta regno ne nur ekzistos en la materia sfero, ĝin funkciigos la lumo kaj la spirito, kiujn klarigi kaj konigi fariĝis mia misio. Tiu ĉi kono aŭ spirita scienco estas la tiel nomata “parakleto, la sankta spirito”. Kune kun la materia scienco, tiu ĉi scienco fariĝos unuigita dieca scienco, kiu estos la fundamento por la surtera realiĝo de tiu ĉi regno.

## 3. La ĉiela regno komenciĝas en la unuopa homo

Nun vi eble dirus, ke estas tede, ke daŭros tiel longe ĝis kiam fariĝos pli bone por la homaro. Sed pro tio tute ne indas maltrankviliĝi, ĉar ĉiu unuopa homo povas mem eniri ĉi tiun regnon. Kiel estas nun, estas tiel kiel Kristo diras: “Mia regno ne estas el tiu ĉi mondo”. – Tio, kion li nomas “sia regno”, ja estas tiu regno, en kiu la amo estas la fundamento, kie oni amas sian proksimulon kiel sin mem. Tiu regno estas ene en vi, tion diras ankaŭ Kristo, kaj tio veras – ĝi komenciĝas ene en la homo.

La regno, kiun oni nomas la ĉiela regno, estas kondukmaniero. Ĝi ne estas temp- kaj spacdimensia regno, sed stato. Tiu stato, kiu estas amo, do estas la fundamento; ĝi estas tio, ke oni povas esti ĝojo kaj beno por ĉio, kion oni tuŝas, kaj tio, ke oni amas Dion super

ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem.

Estas do tiu ĉi stato, kiu eniru la kondutmanieron de la homoj, kaj ĝi ja jam ekaperis ene en la menso kaj kondutmaniero de multaj homoj.

#### 4. La misio de la Afero

Tiu ĉi komenco do estas la komenco de la nova epoko, kiu forigos la militojn, la malsanojn, la zorgojn, la problemojn kaj ĉion, pro kio la homoj suspiras kaj ĝemplendas. En tiu ĉi regno, la amo anstataŭigos la atombombojn kaj ĉiujn tiajn milit- kaj infermaŝinojn kaj batalpretecojn. La enkonduko de tiu ĉi stato en la kondutmanieron estas tio, kio estas la misio de tiu ĉi Afero.

Ĉi tiu Afero, kiu komenciĝis per miaj kosmaj travivaĵoj kaj tio, kion Dio rakontis al mi, kaj kio nun estas donita al vi, estas la komenco de la nova mondepoko aŭ tute nova mondkulturo. Vi ne povas ekhavi kontakton kun tiu ĉi regno serĉante en la spaco; vi ne povas flugi, velboati aŭ migri en ĉi tiun regnon. Sed vi povas, ĉiuj unuope, enkonduki tiun ĉi amostaton en vian kondutmanieron, kaj tiam vi ene de vi mem povos travivi la lumon kaj ekvidi la mondon en tute alia maniero.

#### 5. La tuta mondplano kuŝas en la mano de Dio

Multaj homoj vidas la militojn kiel ion teruran. Ili havas zorgon kaj timas, ke la militoj ruinigos la homaron ktp. Sed tute ne troviĝas kialo senti tiel. La tuta mondplano estas en la mano de Dio.

Tiuj, kiuj hodiaŭ havas la potencon, havas tion nur pro Dio. Ili ne havas la potencon pro sia propra trudiĝemo aŭ siaj propraj kapabloj; ili havas ĝin pro tio, ke Dio metas ĉiun unuope sur sian lokon. Eisenhower estas sur sia ĝusta loko, kaj Ĥruŝĉov sur sia. La diversaj regantoj estas ĉiuj sur sia loko, tiel longe kiel ili povas agi laŭ la kondutmaniero, kiu kongruas kun la nuna situacio. Ĝi ja kongruu kun la kondukado de la nuna situacio ĝis la pli luma stato.

Ja estas necese, ke la militoj kaj ĉi tiaj aferoj povos finludi sian rolon. Tio, kion ni nuntempe spertas, estas la sinmortigo de la militoj. Estas vere, ke venos tre peza tempo denove. La milito ankoraŭ ne atingis sian finon. Sed tiu ĉi milito estos la sinmortigo de la militoj, kaj ĝi ja ne trafos la homojn, kiuj ekhavas la diecan staton; kiuj enkondukas tiujn ĉi pensospecojn de la luma epoko en sian menson. Tiu stato havas la plej grandan protektopovon, ĉar nek



*Dum sia parolado Martinus dankas al ĉiuj pro apogo, helpemo kaj donacoj.*

atombomboj nek aliaj armiloj povas protekti homon. Ne ekzistas pli bona protekto ol elradii amon, ĉar tiu ĉi amo estas la baza tono mem de la universo. Antaŭ tiu ĉi baza tono ĉiuj nuboj devas iri flanken, tio estas la volo de Dio mem. Tio estas la ĉiopotenco kaj ĉioscio de Dio mem, laŭ kiuj la tuta universo estas regata en sia eterna naturo.

Ne indas atendi aŭ cerbumi tiel multe pri tio, kiam do ĝi venos? – Kiam do la milito venos? – La sola, kion mi povas konsili al vi, estas tio ke vi notu kiam estas tiel, ke vi ne povas ami iun? – Ĉu estas iu, kiun mi ne ŝatas? – Ĉu estas iu, kiu malplaĉas al mi? – Ĉu estas iu, kiun mi kritikis aŭ al kiu mi agas malice ktp? – Tie vi havas labor-kampon, kie vi povas ĉion tian forigi. – Kaj samgrade, kiel vi sukcesos tion forigi, la lumo brilos en vian konscion,

kaj vi komencos fariĝi suno por viaj ĉirkaŭaĵoj. Estas tio, kio estas la celo de la kosmaj analizoj. Ili estas la fundamento por la kreado de tiu nova stato, en kiu manifestas sin la dia spirito en ĉiu unuopa estulo.

Estas do tio, pri kio precipe temas. Kaj tio estas la celo de tiu ĉi misio.

## 6. La finverkado de Livets Bog en 1960

Por klarigi aferojn, mi ja ricevis kapblon fari ĉi tiujn analizojn, kiujn mi kolektis en Livets Bog. Dum tiu analizado mi devis preterlasi multajn malpli grandajn analizojn por povi krei la grandajn analizojn, kiuj priskribas la tutan mondplanon. Mi nun estas finverkanta Livets Bog, kie en la lasta volumo estos klarigoj pri ĉiuj grandaj portantaj analizoj. Sed ja estas multaj aliaj aferoj;



*La 11.08.1960 Martinus gaje malfermas 70 jariĝan donacon. Ĉeestas sep jara Kim, filo de Erik Gerner Larsson (1907-1973).*

teknikaj analizoj, kiujn mi ne klarigis. Ili nun venos en verko, kiun mi ilustris per miaj simboloj,<sup>1</sup> kaj kiuj estas suplemento al Livets Bog.

## 7. Danko pro la granda afableco kaj amo

Ĝojigas min vidi, kiel multe la analizoj dum la pasintaj jaroj povis influi vin, kaj kiel tio revenigis al mi tiun grandan amon, kiun miaj analizoj esprimas. Tio donas al mi okazon observi, kiel la karmoleĝo funkcias. Oni ja ne povas nei, ke mi havas brilan karmon, kiam mi vidas tiun grandan aron da homojn kaj aŭdas ĉiujn belajn vortojn, kiuj estas diritaj pri mi. Pri tio mi ĝojas, kaj mi pensas ke mi povas tion diri sen fariĝi gravafekta. [Rid-uragano kaj manfrapado superbruas la voĉon de Martinus.]

Per tio mi do volas danki al tiuj, kiuj aranĝis la feston, kaj dankon al vi ĉiuj pro la granda afableco, kaj dankon al miaj kunlaborantoj, aparte al Gerner Larsson, kiu dum multaj jaroj ĉi tie en Klint kunkreis ĉi tiun lokon, kiun ni nun havas, kaj ankaŭ al Vibeke kaj

Mogens Møller, Bruus-Jensen, kaj ĉiuj, kiuj en la ĉiutaga vivo estas miaj kunlaborantoj. Mi deziras al vi ĉiuj ĉion bonan, kaj ke vi havos bonan tempon dum la vojaĝo antaŭen kaj ekhavos helpon enkonduki ĉi tiun novan kondukmanieron en vian konscion. Multajn dankojn. [Tondraj aplaŭdoj. Granda kaj longa manfrapado de la publiko.]

La 11-an de aŭgusto 1960 en grandega tendo preskaŭ 400 amikoj de Martinus celebris lian 70-jariĝon en Martinus Centro Klint. La 12-minuta parolado<sup>2</sup> de Martinus estis surbendigita.

Originala dana titolo “Martinus’ 70-års fødselsdagstale”. Aperis unuan fojon en dana *Kosmos* n-ro 7, 2012. Prilaborita de Ole Therkelsen kaj aprobata de la konsilio je 2012.04.01. Artikolo n-ro: M1500. Esperantigis ĝin Hokan Lundberg kaj Henning Sato von Rosen.

## Notoj

1. La simbollibroj havas la komunan titolon *La Eterna Mondbildo*.
2. Eblas aŭskulti la originalan danlingvan 12-minutan dankan paroladon per la reto: [www.martinus-institut.dk/da/foredrag/index.php?nr=40](http://www.martinus-institut.dk/da/foredrag/index.php?nr=40).



*Martinus sidas inter Erik Gerner Larsson kaj la festena parolanto Mogens Møller (1914-1980) kaj edzino Vibeke Møller.*



# Kiel prepariĝi por la estonteco?

de Hakan Lundberg

## La estonteco

Pri la estonteco tre malfacilas diri ion ajn kun plena certeco. Tamen, Martinus, uzante sian grandan intuicion, antaŭvidis kaj analizis plurajn aferojn pri la estonteco en siaj libroj kaj prelegoj, interalie en kiun direkton la socio evoluos dum la venontaj jarcentoj. Li ankaŭ donas konsilojn pri kiel indas ŝanĝi sin por la estonteco, se oni tion volas. Pri tio temas tiu ĉi artikolo. Sed ni komencu per iom longa enkonduko al kelkaj el la ĝeneralaj analizoj de Martinus, por tiel faciligi la komprenon pri liaj antaŭdiroj kaj konsiloj rilate la estontecon.

## Intuiciaj respondoj

Martinus (1890-1981) kreskis en dana kamparo kaj ricevis nur tre bazan edukon por poste ekhavi plurajn “simplajn laborojn” kiel laktajisto kaj nokta gardisto. Kiam li estis ĉe 30-jara li trairis fortegajn travivaĵojn kiuj aktivigis en li tre grandan intuicikapablon. Per tiu nova intuicikapablo li povis respondi al plej diversaj tiel nomataj “vivdemandoj” kaj doni analizojn pri la vivo “malantaŭ” la fizika mondo. En REVO (reta-vortaro.de) la vorto “intuicio” havas la jenan difinon: *La kapablo senpere, kvazaŭ instinkte kompreni sen konscia rezonado aŭ esploro.*

La spiritaj travivaĵoj venis kiel grandega surprizo por Martinus kaj li komence ne sciis kiel uzi sian intuicikapablon aŭ “kosman konscion”, sed iom post iom li ekkomprenis ke li havas

grandan kaj gravan taskon antaŭ si, nome doni al la homaro intelektan klarigaron pri kial indegas “alturni la alian flankon”, “ami sian proksimumon kiel sin mem”, “preĝi por siaj malamikoj” ktp. Martinus nomis sian verkon *La Tria Testamento* kaj li celis intelektigi la kristanisman per profundaj analizoj pri la vivo. Tiuj analizoj interalie enhavas detalan priskribon pri nia interna strukturo, nia evoluo dum multegaj vivoj (t.n. *enkarniĝoj*) kaj pri nia nun malfacila situacio estante fine de la besta regno, enironte “la veran homregnon”.

Ĉu la respondoj kaj analizoj de Martinus pri diversaj vivdemandoj estas pli ĝustaj kaj interesaj ol tiuj de aliaj? Pri tio, ĉiuj, kiuj volas, kompreneble faru sian propran prijuĝon! Por mi, respondoj donitaj de religioj ĝenerale estas tro “kredecaj” aŭ “sentecaj” sen klarigaj kaj logikaj analizoj. Aliflanke, respondoj donitaj de natursciencoj por mi ĝenerale estas tro “matericentritaj” aŭ “limigitaj” al la fizika mondo. La respondoj de Martinus estas por mi plej ofte sencohavaj kaj logikaj kvankam mi en periodoj estas dubema kaj malcerta pri ĉio... Ofte ja temas pri aferoj pri kiuj ni ne povas rekte kontroli ĉu ili estas veraj aŭ ne, ekzemple “kio okazas post la tiel nomata morto?”.

Alia grava afero estas ke la analizoj de Martinus kune konsistigas koheran kaj tutecan mondbildon inspiran kaj tre pozitivan el longa vidpunkto. La mondbildo de Martinus estas laŭ mi tre

studinda por ĉiuj kiuj interesiĝas pri vivdemandoj kaj krome estas malfermita al klarigoj kiuj baziĝas je leĝoj kaj principoj eksterfizikaj. La mondbildo aŭ kosmologio de Martinus povas esti tre helpa kaj subtena, aparte se oni sentas sin iom “stranga” en la socio aŭ “perdita” en la vivo. Estas mia espero ke tiu ĉi artikolo veku ankaŭ en vi intereson kaj scivolemon pri la verko de Martinus *La Tria Testamento*, kiu povas esti tre inspira por ĉiuj kiuj volas iom post iom ŝanĝi sin mem kaj prepariĝi por la estonteco!

### **Laŭ Martinus ni estas pli ol nia fizika korpo**

Por tre multaj modernaj homoj estas nature pensi ke ni konsistas sole el nia fizika korpo kaj ke nia konscio estas kreita de kemiaj procezoj ktp en nia cerbo. Krome facilas opinii ke niaj travivado, deziroj, decidoj, sentoj ktp plene estas rezultoj de la aktivaĵoj en nia cerbo. Laŭ la analizoj de Martinus viva estulo estas pli ol la fizika korpo. Li faras la jenajn konstatojn:

- *La fizika mondo konsistas el partikoj, fortokampoj, radioj aŭ energioj, kiuj konstante moviĝas.* (Eĉ la plej solida objekto fizika konsistas el atomoj kiuj siavice konsistas el moviĝantaj partetoj.)
- *Niaj pensoj, sentoj, memoroj kaj konscio ŝanĝiĝas laŭ la tempo kaj sekve konsistas el moviĝoj.*

Martinus ofte revenas al la jena aserto: *moviĝo en si mem ne povas sperti aŭ travivi moviĝon.* Do, se ĉio fizika kaj psika konsistas el “moviĝoj” kaj se estas tiel ke moviĝo ne povas sperti aŭ travivi moviĝon, tiuokaze ni venas al la konkludo ke estas IO, kio ne konsistas el moviĝo, kio estas la spertanto en ni mem. Martinus nomas tiun parton de ni *nia mio* kaj klarigas ke ĝi estas eterna fiksa punkto en nia interna strukturo.

Li faras multajn analizojn pri “nia mio” kaj kiel ĝi estas nedisigeble ligita al nia “superkonscio” kiu konsistas el ia radiforma energio kiun ni ne rekte povas sperti sed kiu donas al ni la kapablon i.a. sperti la vivon kaj stiri niajn pensojn kaj ankaŭ nian korpon. Tiu nedisigebla vivunuco (nia mio kaj nia superkonscio) Martinus nomas “la viva en la viva estulo” aŭ la “mastro de la vivo”.

Do, laŭ Martinus nia fizika korpo estas nur “ilo” per kiu ni povas krei kaj sperti en la fizika mondo. Krome li klarigas ke nia cerbo funkcias kvazaŭ relajsostacio, t.e. ia ligilo inter nia fizika nervosistemo kaj nia radiforma konscio. Laŭ liaj analizoj ĉiuj vivaj estuloj konsistas el tri “partoj” aŭ “principoj” kiuj estas kunligitaj en nedisigebla triunuco. Tiu triunuco konsistas el: 1) *la kreanto kaj spertanto* (nia mio, ia nemateria interna centro) nomata X1, 2) *kreo- kaj spertokapablo* (ia superkonscio, parte nemateria kaj parte “energia”) nomata X2 kaj 3) *kreitaj aferoj* (i.a. nia tagokonscio, niaj memoroj, sentoj kaj pensoj, niaj talentoj kaj nia fizika korpo) nomataj X3.

Kiam nia fizika korpo ne plu povas porti nian tagokonscion, ekzemple pro severa akcidento aŭ malforteco pro alta aĝo, ni forlasas la ne plu funkciantan korpon kaj samtempe ankaŭ la fizikan mondon, alivorte ni “mortas”. En tiu momento nia konscio plene transiras al “korpo” kiu apartenas al nia spirita strukturo kaj kiu konsistas el ia radiforma materio, klarigas Martinus. Simile estas kiam ni dormas, sed kun la diferenco ke tiam nia konscio daŭre havas kontakton kun nia fizika korpo kaj pro tio povas reveni al ĝi, kiam ni vekiga. Kiam ni “mortas”, ni fakte ne mortas, sed simple nia mio, superkonscio kaj konscio plene forlasas nian fizikan korpon kaj transiras al “korpo” radiforma en la spirita sfero.



## Vivon post vivo

Se estas tiel ke ni havas *eternan* “kernon” (X1 kaj X2) kaj ke nia fizika korpo estas portempa “portanto” de nia konscio kaj “ilo” per kiu ni povas vivi en la fizika mondo dum kelkaj jardekoj, tiukaze estas nature ke ni havis multajn fizikajn vivojn en nia evoluo dum la lastaj milionoj da jaroj, opinias Martinus. Laŭ la analizoj de la tria testamento nia konscio, post la tiel nomata “morto”, transiras al radiforma “korpo” kaj ni vivas en la spirita sfero, en “mondo” taŭga kaj interesa por ni (en la spirita sfero ekzistas multaj diversaj “mondoj”). Tie ni havas kvazaŭ ferion aŭ libertempon dum kelka tempo, kutime simile longan kiel nia ĵus forlasita surtera vivo, ĝis kiam denove estos tempo reveni en la fizikan mondon por daŭrigi nian evoluon. Se ni mortas kiel infano, ni jam post kelkaj jaroj estas pretaj denove enkarniĝi, ankaŭ se ni mortas kiel junulo ni relative rapide revenas al la fizika mondo, sed se ni mortas kiel maljunulo ni kutime restas plurajn jardekojn en la spirita sfero por ĝui tre agrablajn kaj interesajn “feriaden”.

Laŭ Martinus ni do vivas alterne en la fizika mondo kaj en ia spirita “mondo”. Ankaŭ kiam ni dormas ni estas en spirita “mondo” dum nia fizika nervosistemo “ripariĝas” por denove povi porti nian tagokonscion dum kelka tempo. Estas nia tempo en la fizika mondo kiu helpas al ni pluevolui, ĉar nur ĉi tie ni kreas novajn talentojn kaj lernas pri la diferenco inter “bono” kaj “malbono”. La fizika mondo donas “reziston”, en ĝi ni povas sperti diversajn problemojn kaj suferojn. Solvante plej diversajn problemojn kaj defiojn, ni iom post iom, dum jarmiloj, evoluigas nian inteligenton. Suferante pro plej diversaj fizikaj kaj animaj spertoj, ni iom post iom, dum jarmiloj, evoluigas nian humanan kapablon, klarigas Martinus. Tiel ni, vivon post vivo, lernas novajn aferojn,

ekhavas novajn spertojn kaj talentojn kaj sekve evoluas al pli kaj pli alte intelektaj kaj moralaj niveloj. Alivorte, ni iĝas pli kaj pli “homaj”.

Alkutimiĝinte al tiu ĉi pensmaniero, la tiel nomata “morto” ne estas io terura aŭ ege trista afero. Laŭ la mondbildo de Martinus mortinto ja pluiras al mirinda kaj agrablega tempo en spirita “mondo”. Ĉiuj spertas sian “paradizon” adaptitan al la personaj interesoj kaj ŝatokupoj inter la fizikaj vivoj, kiuj ne malofte alportas tre pezajn kaj malagrablegajn travivaĵojn, sed kelkfoje ankaŭ tre agrablajn kaj interesajn. Nia eterna vivo ne povus ekzisti se ĝi ĉiam estus luma kaj agrabla, argumentas Martinus. Eterna vivo eblas nur se ni spertas kontrastojn, laŭ la analizoj en la tria testamento.

## Kion signifas eterna?

*Imagu monton el diamanto, mil metrojn larĝa je la fundo kaj mil metrojn alta ĝis la pinto. Ĉiun milan jaron venas birdeto por tre mallonge akriĝi sian bekon sur la monton. Kiam la monto estos tute malaperinta pro la birdeta bekoakriĝado, tiam eĉ ne milona sekundero de la eterneco pasis ekde la unua birdovizito!*

Tiu simbola rakonteto ekzistas en diversaj versioj kaj celas pensigi la leganton pri la koncepto *eterneco*. Laŭ Martinus *eterneco* ekzistas tute ekster tempo kaj spaco kaj el tiu vidpunkto la supra rakonteto ne vere rilatas al *eterneco*, sed ĝi tamen povas pensigi nin pri kiom “senfina” la *eterneco* estas. El teoria vidpunkto ne estas malfacile kompreni la vorton “eterna”. Simple temas pri “io” kio ĉiam ekzistis kaj ĉiam ekzistos. Tamen, ĉio kion ni povas rekte percepti estas io kreita, do io kio havis komencon kaj havos finon. Kreita afero ne povas esti eterna, argumentas Martinus. Eterna povas nur io nekreita esti ...

Sed kio estas nekreita? Nia korpo estas kreita, niaj pensoj estas kreitaj, eĉ nia konscio estas kreita. Sed nia “interna kerno”, nome nia mio (X1) kaj nia superkonscio (X2), ĝi ne estas kreita, ĝi ĉiam ekzistis kaj ĉiam ekzistos kaj do estas eterna, laŭ Martinus. Martinus uzas multajn paĝojn kaj ankaŭ plurajn simbolojn por profunde klarigi tion ĉi per kunligitaj pensoĉenoj. Teoria kompreno pri nia eterna kerno povas esti grava bazo se oni deziras kompreni tio kio okazas en kaj ĉirkaŭ ni mem kaj por povi ŝanĝi nian agmanieron al nia ĉirkaŭaĵo kaj al ni mem!

Simile kiel simio ne havas sufiĉe evoluantan inteligenton por povi legi eĉ plej simplan tekston, ni homoj surteraj ankoraŭ ne havas sufiĉe evoluantan intuicion por povi “legi” (kompreni) “la libron de la vivo”, alivorte por povi “vidi” la bazajn leĝojn kaj principojn malantaŭ la fizika mondo. Martinus aliflanke havis tre altevoluantan intuicikapblon kaj per ĝi li povis priskribi mondbildon, kiu donas teoriajn klarigojn al multaj viddemandoj analizante la bazajn leĝojn kaj principojn kiuj ekzistas en la spirita mondo. Studante ilin kaj elprovante liajn klarigojn kaj konsilojn en sia propra vivo, ni iom post iom atingos evolunivelon en kiu ni mem spertos nian eternan estadon kaj nian eternan evoluon per ia “kosma klarvido”, alivorte per tre granda intuicio, laŭ Martinus. Multaj interesaj aferoj atendas nin dum nia eterna evoluvojaĝo!

### **Evoluo eterna tra mallumo kaj lumo**

Danke al niaj mio kaj superkonscio ni estas eternaj estuloj, klarigas Martinus en siaj analizoj pri la vivo. Tio signifas ke ni neniam ekestis kaj neniam ĉesos ekzisti. Por povi havi eternan spertadon de la vivo ĝi devas okazi laŭ ritmo alterne “luma” kaj “malluma”, ĉar sen

tiuj kontrastoj ne eblus havi eternan vivtravivadon. Tiu ritmo estas regata de du organoj en la superkonscio kiujn Martinus nomas “la maskla poluso” kaj “la femala poluso”. Kiam tiuj du polusoj estas en ekvilibro ni trairas “luman” epokon, ĉefe en la spiritaj mondoj dum multaj jarmilionoj. Sed kiam ni estas unupolusaj, aŭ kiel vir- aŭ kiel virin-estulo, ni trairas “malluman” epokon en la fizika mondo dum multaj jarmiloj. La eternan evoluon Martinus apartigas en ses regnojn: 1) “la plantoregno”, 2) “la bestoregno”, 3) “la vera homregno”, 4) “la saĝoregno”, 5) “la dia mondo” kaj 6) “la beatoregno” (kiu enhavas spiritan periodon kaj poste fizikan periodon, en la tiel nomata “minerala regno”). Laŭ Martinus la eterna evoluo iras en *spiralcikloj*. Tio signifas ke trairinte la ses regnojn de unu spiralciklo ni poste eniras novan spiralciklon kun la samaj ses regnoj sed en pli alta nivelo kaj mal-sama apero.

Ni homoj surteraj nun estas en la fino de “la bestoregno”, ni daŭre estas “virino” aŭ “viro” kaj pro tio ne havas plenan ekvilibron inter niaj polusoj, sed nia “mala poluso” (la maskla por la virinoj kaj la femala por la viroj) estas kreskanta, sekve viroj iom post iom iĝas malpli “viraj” kaj virinoj iĝas iom post iom malpli “virinaj”. Antaŭ miliono da jaroj ni vivis kiel plantoj, sed tiam nur parto de nia konscio estis en la fizika mondo, ĉar ni tiam ĉefe vivis en niaj propraj memoroj de la pasinta spiralciklo, klarigas Martinus. Kiel plantoj, aŭ parto de planto, niaj polusoj estis daŭre en ekvilibro, kiel ili estas en la spiritaj mondoj, sed iom post iom ekestis malekvilibro inter ili (unu el la polusoj ekmalkreskis), kaj tio estis la komenco de nia tempo kiel vir- aŭ virin-estulo. Tra pluraj transiraj paŝoj, ekzemple kiel viandomanĝantaj plantoj, ni atingis “la bestoregnon” kaj tiam ekvivis en propra fizika korpo kiel aŭ

vir- aŭ in-besto. Kiel bestoj ni travivis “mallumajn” periodojn kaj ankaŭ “lumajn”, vivante plej ofte en harmonio kun la naturo. Por multaj bestoj estas tute nature uzi la mortigan principon por akiri manĝaĵon, ekhavi partneron, protekti sian familion ktp.

Nuntempe ni estas estuloj kvazaŭ inter du regnoj, t.e. “la bestoregno” kaj “la vera homregno”, kaj pro tio ni devas multajn novajn aferojn lerni kaj ankaŭ multajn aferojn forlasi por povi denove vivi en plena harmonio kun la vivo. En ondoj ni terhomoj spertas multe da “mallumo” kaj trairas suferadon pro tio ke ni ankoraŭ havas plurajn bestajn trajtojn en nia konscio kaj sekve ne povas plene vivi laŭ la devizo “ami sian proksimulon kiel sin mem” kio estas la kondiĉo por esti “preta homo”. Kiam ni atingos tiun staton, ni transiros al “la vera homregno” kaj tiam niaj du polusoj estas en perfekta ekvilibro denove, klarigas Martinus. Pro tio ke niaj polusoj estas en malekvilibro en “la bestoregno” ekzistas ĵaluzo kaj luktado por trovi partneron, pozicion en la grego, sian teritorion kaj tiel plu. Iagrade tiaj ĵaluzoj kaj reciprokaj luktaĵoj ekzistas ankaŭ fine de “la bestoregno”, do por ni terhomoj – kaj inter individuoj kaj inter homgrupoj kaj inter tutaj nacioj. Sed iom post iom ni evoluas kaj sekve niaj polusoj atingas ekvilibron, tiam la bezono trovi partneron el la mala sekso iom post iom malaperas kaj pro tio ankaŭ granda konflikto inter la homoj.

Martinus klarigas ke ni mem iam antaŭ longega tempo sopiris al la “mallumo” kiun ni nun travivas, ĉar spertante la “lumon” en la plej altaj spiritaj mondoj dum oceanoj da tempo (en “la vera homregno”, “la saĝoregno” kaj “la dia mondo”), ni finfine komencis sopiri al kontrastoj, al io alia ol la perfekte harmonia vivo. Tiam ni komencis eniri niajn proprajn memorojn de la pasinta spiralciklo kaj iom post iom iĝis parto

de “la beatoregno”, kiu estas loko tute sen ekstera vivo. En la lasta duono de “la beatoregno” ni vivis kiel parto de iu mineralo en la fizika mondo sed daŭre nur en niaj propraj memoroj. Tiu “inter-na” vivo estas la fino de unu spiralciklo kaj la komenco de nova spiralciklo en nia eterna vivovojaĝo ...

En kvin regnoj de la evoluo ni ĉefe “lumon” travivas, sed en unu el la regnoj, en “la bestoregno”, ni travivas multe da “mallumo”. Sen tiu malluma periodo ni ne povus “renovigi” nian konscion kaj pluteni nian eternan evoluon kaj vivon. Do, el eterna vidpunkto la “mallumo” estas tute bezonata por nia vivtravivado, ĉar sen kaj “lumo” kaj “mallumo” ne ekzistus kontrastoj, kaj sen kontrastoj la vivo tute ne estus ebla, argumentas Martinus. Unu el la grandaj celoj de la analizoj de Martinus estas ĝuste montri kial kaj “lumo” kaj “mallumo” estas bezonataj en la eterna evoluo de la vivo. Martinus nomas ilin “la agrabla bono” kaj “la malagrabla bono” ĝuste ĉar ambaŭ estas absolute bezonataj aŭ utilaj kaj pro tio bonaj.

### **“Diabla konscio” – nek besta nek homa**

Pli frue en la evoluo ni estis bestoj kaj nuntempe ni ankoraŭ havas multajn bestecajn trajtojn en niaj konscio kaj korpo. Laŭ Martinus ni homoj sur la tero ankoraŭ ne estas “pretaj homoj” sed daŭre apartenas al la bestoregno, tamen en la fina parto de ĝi. Kiam en homo restas multe da egoismo, poten-cavido, agresemo ktp en la konscio samtempe kiam aperas pli kaj pli da inteligento en la konscio (pro solvado de plej diversaj problemoj dum pluraj vivoj), tiam ekestas tre “danĝera” mikso, kiun Martinus nomas “diabla konscio”. Li uzas tiun terminon por montri ke tiu konscistato estas nek besta nek homa, sed mikso inter bestaj trajtoj kaj “malvarma” inteligento. Estas la “diabla

konscio” kiu kapabligas terhomon militi per plej efikaj armiloj, starigi koncentrejojn, aranĝi “vendadon de homoj”, perforti infanojn, riĉiĝi misuzante laboristojn, eksperimenti per bestoj, havi bredfabrikojn ks. Tiajn teruraĵojn la bestoj ne povas elpensi, ili ne havas sufiĉe da inteligento por tio. Nur terhomoj kun inteligento kaj sen granda moralo, sen profunda humana kapablo povas fari tiajn teruraĵojn. Ĉiuj tiuj teruraj aferoj kreis kaj daŭre kreas ĝisostan suferadon por multegaj homoj kaj bestoj sur la tero. Ĝuste tiu suferado kreskigas la humanan kapablon en ni. Sen travivado de suferoj kaj pezaj problemoj plej diversaj, ekzistus neniu humaneco, neniu moralo en nia konscio, laŭ la analizoj de Martinus.

Tio povas soni strange, mallogike kaj malagrabla! Martinus uzas multe da spaco en sia verko por klarigi ke sen suferado, sen trairado de tre malagrablaj travivaĵoj, sen la “diabla konscio” la evoluo de besto al “nepreta homo” (t.e. ni terhomoj kun kaj homaj kaj bestaj flankoj) kaj pluen al “preta homo” (t.e. homo en kiu restas neniu besta flanko de la konscio) ne povus okazi. Nur kreskanta humana kapablo povas helpi al ni plene forlasi la bestoregnon kaj iom post iom igas nin pacamantoj kiuj neniel emas partopreni en konfliktoj aŭ malbona traktado de aliaj homoj aŭ bestoj. Tian grandigantan humanan kapablon ni ekhavas sole per diversa suferado, nenio alia povas krei ĝin! Por ŝanĝi bestan (egoisman) konscion al tuthoma (plene malegoisma) konscio necesas tre longa tempo kun, kiel jam dirite, multe da suferado en ondoj. Nenio alia povas helpi en tiu ĉi situacio. Sed kiam terhomo atingas certan moralon, tiam peza suferado ne plu estas bezonata, tiam teoria kompreno pri la spiritaj flankoj de la vivo kaj praktika ekzercado pri esti “bona homo” estas la ĝustaj “medikamentoj”.

Kvankam la homoj surteraj estas pli evoluintaj ol besto, multaj el ili kreas pli da suferado al sia ĉirkaŭaĵo ol povas besto fari, ĝuste pro la “diabla konscio”, t.e. mikso inter bestaj trajtoj kaj “malvarma” inteligento. Tamen la “diabla konscio” rezultigas suferadon kaj danke al ĝi ni terhomoj pluiras en la evoluo al multe pli hela kaj agrabla estonteco. Unu el la grandaj partoj en la misio de Martinus estas montri ke la suferigaj agoj kaj la suferado mem – do ĉiu malumo kiu ekzistas sur la tero – fakte havas sencon, ĉar sen ĝi la evoluo tute stagnus kaj ni neniam liberiĝus de niaj bestaj flankoj kaj neniam iĝus “pretaj homoj” kiuj kapablas nur ami kaj nur esti lumo kaj beno por sia ĉirkaŭaĵo.

### **Karmo – la plej bona instruado el plurviva vidpunkto**

Krom reenkarneigo ekzistas ankoraŭ tre grava principo kiu multe rilatas al nia evoluo tra la bestoregno – ankaŭ ĝin Martinus detale priskribas en siaj libroj. Laŭ Martinus ne ekzistas pli bona instruado ol tiu bazita sur la karmoprincipo, nome “*tio kion ni faras al aliaj ni mem iam spertos*”. Spertante niajn proprajn agojn, kvankam ni kutime ne konscias pri tio, ni iom post iom vere lernas distingi inter “bono” kaj “malbono”. NUR SE oni vidas nian estadon el plurviva vidpunkto la karmoprincipo havas sencon kaj estas klarigebla. Tamen, ne ĉiam estas facile kompreni, memori kaj akcepti la karmoprincipon! Kiel ŝajne tute afabla kaj pacema homo povas sperti fizikan atakon, ŝtelon aŭ eĉ murdon? Martinus klarigas ke multaj “malbonaj” agoj, faritaj dum pluraj vivoj, povas “sumiĝi” kaj reveni kiel koncentrita malluma karmo, ekzemple torturado aŭ seksa perforto aŭ murdo.

La karmoprincipo verŝajne estas la plej malfacile akceptebla principo el ĉiuj analizoj de Martinus. Estas kontraŭ nia homa naturo pensi pri karmo kiam

ni vidas suferadon, ĉar ni ne volas ke tiuj homoj mem estu “kulpaj”. Ĉi tie gravegas substreki ke tute ne temas pri “kulpo”, sed pri “nescio”. Kiam homo dum jaroj manĝas viandon, aŭ en alia maniero partoprenas en la mortigado de bestoj aŭ misuzas aliajn homojn, ŝi faras tion ĉar ŝi ne vere komprenas ke estas malbone tion fari aŭ ĉar ŝi simple ne povas ne fari tion, pro longdaŭra kutimo. Sed tio ja estas pardoninda afero! Pardoninda, sed tamen ŝanĝinda agmaniero ...

Se oni ne komprenas ion, ja mal-facilas agi laŭ tiu ne-ekzistanta kompreno. Martinus montras ke ĉiuj agoj estas pardonindaj, ĉar ĉiuj agas laŭ siaj antaŭaj travivaĵoj kaj ne povas agi en alia maniero ĝuste nun. Pensu pri Jesuo, kiu suferegante sur la kruco diras: *Pardonu ilin, ĉar ili ne scias kion ili faras*. Kompreneble ili sciis ke ili mortigas homon, sed el kosma (eterna) vidpunkto ili ne sciis aŭ ne povis kompreni aŭ ne kuraĝis rifuzi tiun agon. La sola afero kiu povas vere komprenigi homon pri “misagoj” aŭ “malbonaj agoj” estas ke ŝi mem estu spertinta similajn agojn. En tiu maniero ni ĉiuj lernas, vivon post vivo, kiel agi al aliaj por mem havi agrablan tempon kaj ankaŭ doni ion agrablan al nia ĉirkaŭaĵo. Tiu lernado ne okazas rapide! Jarmiloj aŭ eĉ jarmilionoj estas bezonataj por ŝanĝi sovaĝan beston al “primitiva homo”, poste al “kulturhomo” kaj fine al tute pacema kaj plene amanta homo sen ajna bestotrajto en sia konscio. Laŭ Martinus ni neniam iĝus “pretaj homoj” se ne ekzistus la pedagogiko de la vivo mem, nome la konsekvencoj de la *karmoleĝo* dum multegaj reenkarniĝoj.

### **Karmo – donas plenan justecon al la vivo *el eterna vidpunkto***

Krom ke la karmoleĝo donas la plej bonan instruadon el plurviva vidpunkto, ĝi ankaŭ donas plenan justecon al la

vivo, el eterna vidpunkto. Martinus diras: “*Neniu povas suferi maljuste, neniu povas agi maljuste.*” Denove gravegas substreki ke tia diraĵo nur validas se oni analizas la vivon el eterna vidpunkto, do kun la elirpunkto ke ni ĉiam ekzistis kaj ĉiam ekzistos kiel vivaj estuloj en eterna evoluo kiu portas nin alterne tra lumajn kaj mallumajn epokojn senfine. Laŭ la kosma mondbildo, ĉio kion ni travivas estas aferoj kiujn ni mem iam faris – aŭ en la nuna vivo aŭ dum iu pasinta vivo en la fizika mondo aŭ dum pluraj antaŭaj fizikaj vivo aŭ eĉ iam en la bestoregno en la pasinta spiralciklo!

Kiel dirite en la supra parto, kelkfoje estas tiel ke multaj faritaj “malgrandaj aferoj” sumiĝas al “granda afero”, kiun oni povas sperti koncentrite en tre malluma karmo. Gravegas memori ke malluma karmo ekzistas sole por helpi al ni evolui – sen ĝi ni ne povus vere kompreni kio bonas kaj kio malbonas kaj finfine forlasi la bestoregnon enironte en la veran homregnon. Ankaŭ gravegas memori ke malluman karmon ni spertas nur en la bestoregno kaj iomete en la plantoregno – en ĉiuj aliaj regnoj estas harmonio, lumo kaj feliĉo! Nur se oni havas eternan elirpunkton eblas bone kompreni la karmoprinciplon kaj akcepti ke “la mallumo” ekzistas por helpi al ni.

Do, la karmoprincipo donas la plej bonan pedagogikon el plurviva vidpunkto, donas plenan justecon al la vivo el eterna vidpunkto kaj ankaŭ estas tute bezonata por ke vivo entute povu ekzisti. Per siaj sentoj tute ne estas facile akcepti kaj kompreni la karmoleĝon. Sed analizante situacion el plurviva vidpunkto kaj uzante la pensoĉenojn donitajn de Martinus pri la karmoprincipo, eblas per sia intelekto akcepti kaj kompreni ĝin. Poste restos tamen granda paŝo por povi ĉiam memori la karmoleĝon en sia ĉiutaga vivo, tiel ke oni povas vere kompreni kio

okazas kiam oni spertas ion malagrabilan... Laŭ tiu pensmaniero, la homoj en nia ĉirkaŭaĵo estas “mesaĝodonantoj” aŭ “perantoj” de niaj propraj agoj de la pasinteco, kiuj nun revenas al ni tra ili, por ke ni havu la eblon mem sperti la konsekvencojn de nia propra agado pasinta – do, por helpi al ni kompreni kaj evolui, por vere lerni la diferencon inter “bono” kaj “malbono”!

### “Pardonado de la pekoj” – nova klarigo

Estante bestoj kaj primitivaj homoj ni ofte mortigis kaj vundis aliajn. Martinus montras en sia verko ke tiuj mortigado kaj vundoago revenas al ni pro la karmoleĝo kaj danke al tiu leĝo ni pluiras en la evoluo. Tamen, ne ĉiu malluma karmo devas reveni al ni... Ekzemple se virino antaŭ du vivoj mortigis alian homon kaj ke ŝi dum la pasintaj du vivoj trairis plurajn pezajn malfacilaĵojn, eble longdaŭran malsanon, tiel ke ŝia humana kapablo kreskis ĝis tiu nivelo ke ŝi ne plu volas mortigi aŭ fizike vundi alian homon. Simple ŝi iĝis tro humana por povi plenumi murdon aŭ korpokripligadon. Tiuokaze tiu virino liberiĝas de sia “murdokarmo” de la pasinteco. Tiun karmoliberiĝon, kiu okazas pro morala maturiĝo, Martinus nomas “pardonado de la pekoj”. Li do prenis koncepton el la Biblio kaj donis al ĝi novan klarigon. Kiam persono atingas evolustaton en kiu li aŭ ŝi ne plu povas murdi alian homon, tiam tiu persono ne plu bezonas “murdokarmon” kaj sekve liberiĝas de ĝi. Tiel klare videblas ke la karmoleĝo ne rilatas al “puno”, sed ke ĝi estas pedagogia principo.

Laŭ Martinus, viandomanĝanto kutime havas grandan malluman “karmaron”, pro tio ke li aŭ ŝi ne rekte partoprenas en la buĉado de multegaj bestoj. Unu el la efikoj de “viando-karmo” povas esti manko de

protektado en diversaj situacioj. Ekzemple aŭtoakcidento povas rilati al viandomanĝado, klarigas Martinus. Sed tuj kiam viandomanĝanto, pro novaj humanaj kapabloj, decidas ĉesi manĝi viandon kaj fiŝaĵon, li aŭ ŝi aŭtomate liberiĝas de sia “viando-karmaro”, danke al la principo “pardonado de la pekoj”.

### Mallumo nun, poste multe da lumo

Ĉiu nia suferado, do nia malluma revenanta karmo, estas parto de granda kaj tre longdaŭra plano por pluevoluigi nin kaj finrezulte helpi nin tute forlasi la bestan regnon. Sed se oni konas nur malgrandan parteton de sia milionjara evoluplano, estas neeble kompreni la sencon de ĉiu suferado en sia vivo kaj en la mondo! Pro tio Martinus donis al ni analizojn kiuj montras kial “la mallumo”, la suferado, la malluma karmo kaj la “diabla konscio”, estas tute necesaj faktoroj de niaj *eterna* vivo kaj evoluo. Helpe de lia mondbildo ni povas ekhavi teorian superrigardon de nia evoluvojo. Havante tian superrigardon eblas, almenaŭ teorie, ekkompreni kaj ekakcepti ĉiujn mallumajn okazaĵojn kiujn ni mem spertas kaj ankaŭ ĉiujn “teruraĵojn” en la cetera mondo, kiel partojn de grandega plano por ni mem kaj la tuta homaro. Ĉiuj suferoj sekve estas prilaborado fare de la vivo pretigi nin (la homaron) por la vera homregno. Do, iasence la suferoj helpas al ni... Tio povas ŝajni tute nekredbla kaj ankaŭ freneza! Sed kiel ĉiam kiam ni observas la vivon uzante la mondbildon de Martinus, endas memori ke laŭ ĝi ni ĉiuj estas eternaj estuloj.

Nur en unu el la ses “regnoj” de spiralciklo, nome en la bestoregno, ni travivas tre (kelkfoje treege) malagrabilan “mallumon”. Sed en ĝi ni ne suferas konstante, ni ankaŭ multon agrablan spertas ĉi-regne. Tamen, ne malofte ni spertas malluman karmon

en la bestoregno kaj kelkfoje ni trairas vere teruran suferadon pro tre malluma karmo kiu revenas al ni koncentrite. Kiel jam dirite, ĉi tiuj suferoj kaj suferoj estas tute necesaj por ke ni povu tute forlasi la bestoregnon kaj eniri la veran homregnon. Laŭ la analizoj de Martinus ni renovigas nian konscion en la bestoregno. En la plantoregno ni daŭre estas ĉefe spiritaĵoj estuloj spertante travivaĵojn de la pasinta spiralciklo, sed en la bestoregno ni plene vivas en la fizika mondo.

Martinus klarigas ke dum jar-milionoj nia konscio iom post iom “malgrandiĝis” kaj kiel plantoj kaj kiel bestoj ni perdidis nian aliron “la kosman saĝon” de la universo kaj ni perdis nian kapablon intelekte analizi kaj kompreni aferojn per nia inteligento. Sed nun estas tempo rehavi tiujn kapablon kaj aliron! Manĝante de “la arbo de la scioj”, t.e. elprovante plej diversajn aferojn en la vivo kaj spertante la efikojn de tiu elprovado, ni iom post iom ekhavas renovigitan konscion per kiu eblas aliri “la kosman saĝon” denove. Martinus nomas tian konscion “*kosma konscio*” kaj klarigas ke ĝi aperas en estulo kun plena ekvilibro inter siaj polusoj kaj kun multe da intelektigita sento (amo) en sia personeco.

Kiel teraj homoj ni ne havas grandan konon pri la vivo kaj ties bazaj leĝoj eksterfizikaj. Do, kompreneble ni faras multajn “misprezojn” (erarojn) kaj sekve en ondoj suferas kaj plurfoje denove suferos. Nun la situacio tamen komenciĝas ekesti iom alia. Iom post iom ni ekhavas pli da inteligento kaj ankaŭ pli kaj pli grandan humanan kapablon. Homo, trairinta multajn vivojn en la fizika mondo kun plej diversaj solvendaj problemoj kaj ankaŭ grandaj suferoj, havas kiel rezulton de tio kaj evoluantan inteligenton kaj evoluantan humanan kapablon. Sed ni ankoraŭ ne atingis la finon de tiu ĉi evoluo en

la fizika mondo. Por plialtigi sian inteligenton, oni povas ekzemple studi en diversaj lernejoj aŭ en aliaj manieroj uzi sian pensan aŭ intelektan kapablon. Sed sian humanan kapablon oni ne povas grandigi per studado aŭ intelekta laboro, nur propra suferado povas kreskigi ĝin. Tamen, teoria studado povas instigi nin agi pli humane kaj ekzerciajn homajn trajtojn, sed sen propra suferado ni neniam povus forlasi la bestoregnon kaj vere iĝi “pretaj homoj”.

Homo kiu jam atingis stacion en kiu ŝi havas evoluantan humanan kapablon kaj evoluantan inteligenton, agas pli kaj pli pace kaj ameme al sia ĉirkaŭaĵo. Ŝi havas bonan rilaton al ĉiuj homoj en sia ĉirkaŭaĵo kaj ne ofendiĝas, krome ŝi ne volas ĝeni la bestojn kaj pro tio manĝas vegane. Ŝi atingis ekvilibron inter sia “senta” kaj “intelekta” flankoj kaj estas preskaŭ ĉiam en harmonio kvankam ŝi daŭre renkontas diversajn malfacilaĵojn de tempo al tempo. En la konscio de tia harmonia kaj sent-intelekt-ekvilibra homo amema kaj saĝa aŭtomate ekaperas pli kaj pli da intuicio. Iun belan tagon tiu kreskanta intuicio donas “kosman ekbrileton”!

Kosman ekbrileton Martinus priskribas kiel mallongan sed tre fortan internan travivaĵon kies spuroj povas resti en la konscio dum pluraj jaroj. Dum tia “brileto” oni dum momenteto ekhavas kontakton kun la senfina saĝofonto de la universo kaj povas per ĝi vere ekscii ke ni ĉiuj estas eternaj estuloj aŭ ke amo estas la baza tono de la universo aŭ ke “ĉio estas bona” (kvankam tute ne aspektas tiel el loka perspektivo) k.s.. Komence terhomo ne povas sperti plurajn ekbriletojn dum unu fizika vivo, sed pli poste en la evoluo ili venas pli frekvente ĝis kiam aperas la tiel nomata “granda naskiĝo” kaj la koncerna homo tagkonscie kaj konstante havas plenan aliron al la saĝofonto de

la universo, alivorte ŝi ekhavis “kosman konscion”, laŭ la terminoj de Martinus.

Nur per la intuicio eblas mem rekte sperti la solvon de la vivmistero, diras Martinus. Laŭ lia takso ĉiuj homoj sur la tero ene de kelkaj jarmiloj havos altevoluintan intuicikapablon, kosman konscion kaj sekve estos tiel nomataj “pretaj homoj”. Ni tiam estos tute pacemaj, tre saĝaj kaj amemaj kaj sen ajna besta trajto en nia konscio. La analizoj de Martinus donas al homoj kiuj interesiĝas pri lia verko, novan teorion komprenon pri la vivo, kaj tio povas esti tre grava afero por instigi pardonemon, komprenemon kaj amemon. Kiam oni vere sukcesas apliki la kosmajn analizojn en sia ĉiutaga vivo dum longa tempo, tiam oni jam survojas al kosma ekbrilo kaj al “nova mondo”.

Laŭ Martinus, nek religiaj “dogmoj” nek materiistaj “dogmoj” povas doni al modernaj homoj la necesan bazon por profunde kompreni la vivon kaj ekscii kiuj ŝanĝoj estas nepraj por eniri tute pacan kaj amoplanan vivstaton. Sed danke al la tria testamento eblas ekhavi teorion komprenon pri la grandaj vivdemandoj kaj tiel ankaŭ fortan instigon ŝanĝi sian agmanieron al aliaj vivaj estuloj, ne nur al aliaj homoj, sed ankaŭ al la bestoj, la naturo kaj la mikroestuloj enkorpaĵaj. Tia aplikado de la analizoj iom post iom transformos nin, tiel ke ni en la estonteco iĝos niaj “propraj profetoj”, ĉar per altevoluinta intuicikapablo ni havos aliron al ĉiuj “respondoj” pri vivdemandoj kaj rekte spertos kion signifas esti eterna estulo, kio estas Dio kaj ke la diraĵo “ĉio estas tre bona” estas absoluta vero se oni rigardas la vivon el eterna vidpunkto. Almenaŭ tiel Martinus prezentas la aferon.

### **Kio estas Dio, la Providenco kaj anĝeloj?**

Laŭ Martinus, Dio estas ĉio kio ekzistas. Tiu “ĉio” estas viva, do vivanta

estulo, asertas Martinus. Ke Dio estas absolute ĉio kio ekzistas en la universo, tion eblas teorie kompreni. Sed ke tiu ĈIO estas vivanta estulo kun kiu eblas havi personan korespondadon kaj intiman rilaton, tion oni povas mem sperti nur kiam oni havas altan intuicikapablon. La Providenco estas, laŭ la difino de Martinus, la unuaranga parto de Dio kaj ĝi konsistas el estuloj kiuj atingis la plej altajn sferojn de spiralciklo. Do, temas pri spirita estuloj kiuj ne bezonas reenkarigiĝi por morale evolui en la fizika mondo sed kiuj vivas en la spirita mondo konstante. Tiuj “di-estuloj” havas kapablojn kiujn ni ankoraŭ ne povas bone kompreni aŭ imagi. Estas tiaj altevoluintaj estuloj kiuj gvidas kaj superrigardas la evoluon sur la tero kaj ankaŭ funkcias kiel “anĝeloj” aŭ “spirita gvidantoj”.

Martinus klarigas ke ekzistas du specoj de anĝeloj: 1) altevoluintaj estuloj kiuj ne plu reenkarigiĝas kaj 2) homoj kiuj inter du fizikaj vivoj volas agi kiel “gardanĝelo”, ofte por parenco aŭ kara amiko en la fizika mondo. La gardanĝeloj povas iel “vidi” niajn pensojn kaj nian aŭreolon, do la spiritaĵojn kiuj ĉirkaŭas nian fizikan korpon. Kiel la “gardado” funkcias praktike, Martinus ne detaligas. Sed li klarigas ke ni homoj sur la tero ĉiam havas almenaŭ unu “ordinaran gardanĝelon” kiu superrigardas nian evoluon dum pluraj fizikaj vivoj. Ĝi protektas nin kiam protektado kongruas kun nia evoluvojo kaj ĝi gvidas nin en malluman sorton kiam tio kongruas kun nia evoluvojo. Nur vere altevoluinta estulo povas havi tiun respondecon, ĉar ĝi vidas kion ni jam travivis kaj kion ni ankoraŭ bezonos travivi por atingi pli altan evoluŝtupon.

Estas la gardanĝeloj kiuj aŭdas ĉiujn niajn “preĝojn” aŭ helpopetojn kaj ili povas doni subtenon al la petanto, sed kutime ili ne povas forpreni malhelan



karmon, ĉar tio kontraŭus la vivleĝojn kaj malhelpus al la petanto ricevi la necesajn travivaĵojn por povi pluiri en la evoluo. Sed la anĝeloj povas doni kuraĝon kaj fortojn por trairi malhelan sorton, pro tio ĉiam bonas preĝi kiam oni spertas malfacilaĵojn aŭ timon pri iu okazaĵo. La anĝeloj ankaŭ povas doni subtenon kaj konsilojn pri ekzemple gravaj decidoj, sed ankaŭ pri malgrandaj ĉiutagaĵoj. Martinus konsilis ofte preĝi en si mem por peti helpon aŭ konsilon en plej diversaj situacioj kaj por havi harmonian rilaton al sia ĉirkaŭaĵo. Li ankaŭ donis novajn klarigojn al la preĝo "Patro nia". Tiujn klarigojn kaj analizojn eblas legi en la libreto "La mistero de la preĝo". Martinus malkonsilis komunan preĝadon, ĉar laŭ lia opinio pli bonas ekhavi personan kontakton kaj rilaton kun Dio. Eĉ se oni tute ne kredas je Dio aŭ anĝeloj utilas "vortigi" siajn dezirojn, pensojn, dubojn, esperojn ks en si mem kaj peti helpon "supren", laŭ Martinus.

### **Diversaj sintenoj al "Dio"**

Por homoj kiuj plene satiĝis je religia kredado povas esti tre malfacile pensi serioze pri aferoj kiel "gardanĝeloj", preĝado kaj "Dio". Tiaj homoj ne plu havas religian instinkton en sia interna strukturo. Sed homo kiu ankoraŭ nomas sin kredanto kutime daŭre havas restaĵojn de la religia instinkto en sia konscio. La tiel nomataj materiistoj delonge perdis sian religian instinkton kaj kutime tute neas ke povus ekzisti gardanĝeloj aŭ iu Dio. Kreskinta kaj plukreskanta inteligento kaj daŭre malgranda intuicikapablo faras ke tiaj homoj plej ofte ne trovas la klarigojn de la religioj sencohavaj, kaj samtempe ili ankoraŭ ne povas mem "senti" aŭ konkludi ke ekzistas io pli en la universo ol la fizika mondo. Iom post iom diversspecaj spertoj kaj suferoj kreskigas la humanan kapablon en ĉiuj

terhomoj. Kiam ekestas ia ekvilibro inter kreskinta inteligento kaj iom post iom grandiganta humana kapablo, tiam la intuicikapablo komencas aperi en la konscio. Sed por ke la intuicio povu kreski al alta nivelo en individuo, unue grandaj humileco, afableco kaj pardone nemo devas maturiĝi en ĝia personeco tiel ke ĝi ĉiam provas esti pacema kaj amema. Laŭgrade kun tiu evoluo, la sinteno al "Dio" ŝanĝiĝas en la homo, laŭ la analizoj de Martinus.

Zamenhof estas bona ekzemplo de tio ke homo povas trairi diversajn stadiojn rilate al Dio dum unu fizika vivo: 1) "naiva kredado" 2) "ateisma nekredado" 3) "humila ekkomprenado". Kiel infano Ludoviko estis kredanto subtenante de sia patrino, kiel junulo li estis materiisto malesperanta kaj iom poste en sia vivo li eksentis ke ekzistas "*potenca senkorpa mistero, Fortego, la mondon reganta*". (Pli pri tiuj stadioj eblas legi en la libro "Vivo de Zamenhof" de Edmund Privat.)

Martinus klarigas ke multaj homoj trairas tiajn tri stadiojn en la evoluo, sed tio ne signifas ke oni trairas ĉiujn tri en la nuna vivo. Kelkaj restas "kredantoj" dum sia tuta vivo en la nuna enkarniĝo, aliaj estas "ĝisostaj ateistoj" ĝis la morto. Martinus klarigas ke oni ripetas aferojn en sia personeco de antaŭaj vivoj dum la unuaj 30 jaroj en sia nuna vivo. Do, homo kiu unue havas "infanan religion", transiras al materiista periodo kiel junulo kaj post tio denove komencas interesiĝi pri vivdemandoj kaj religiaj aferoj sed ekster la eklezio, tia homo kvazaŭ montras kian vojon plej multaj homoj estas trairantaj, tamen ne dum unu vivo sed dum multaj.

Kiam homo estas preta forlasi la materiistan sferon kaj komencas senti ke ekzistas io pli en la universo, kutime estas, kiel jam dirite, malfacile denove rilati al Dio, gardanĝeloj, preĝado ks pro la longdaŭra kutimo tute nei kaj eĉ

malestimi tiajn aferojn, sed iom post iom ni transiros la materiistan “barilon” kaj kuraĝos uzi internan preĝadon por denove ekstarigi personan kaj intiman rilaton al Dio. Tamen, tio ne venas tuj kaj ne indas puŝi sin al io kio sentiĝas nenatura aŭ stranga. Aliflanke oni ja ne riskas ion se oni iom provus preĝadon, ekzemple pri kiel ekhavi pli bonan rilaton al iu “malamiko”, por vidi ĉu tio povus havi bonan efikon. La preĝado estas unu granda kampo esplorinda kiam temas pri ŝanĝi sin mem kaj iom post iom prepariĝi por la estonteco.

### **Du specoj de amo**

Martinus apartigas “amon” en du specojn: “kondiĉa amo” kaj “senkondiĉa amo”. La “amo” en la bestoregno, al kiu ni ankoraŭ apartenas, estas grandparte “kondiĉa”. “Amo” al sia partnero ekzemple preskaŭ ĉiam estas kondiĉa: “Mi amas vin! (Sed nur se vi reamas nur min...)” Sed tia “amo” povas rapide malaperi se io okazas en la rilato. Pensu pri ĉiuj geedziĝoj kaj postaj malgeedziĝoj, kelkfoje aperas forta malamo kaj dolorigaj konfliktoj en tiuj situacioj inter la eksamantoj.

La “senkondiĉa amo” aliflanke estas neniel egoisma aŭ subjektiva. Tia amo estas donata al ĉiuj kaj ĉio sendepende de la situacio aŭ la kondiĉoj. En la bestoregno apenaŭ ekzistas “senkondiĉa amo” kaj ni terhomoj ankoraŭ ne multe spertas aŭ praktikas ĝin. Kiam ni donas “amon” al iu, ni kutime atendas rehavi ian dankemon aŭ afeblecon, sed se ni ne ricevas tion, nia “amo” facile ŝanĝiĝas al malpli nobla sento en nia konscio. Homo kiu sentas senkondiĉan amon neniel atendas rehavi ion post tio.

Martinus klarigas ke nur tiuj kiuj havas sian masklan kaj femalan poluson en harmonia ekvilibro povas centel-cente ami senkondiĉe laŭ la diraĵo “ami sian proksimumon kiel sin mem”. Bestoj ne havas ekvilibron inter siaj du

polusoj, sed aperas kiel vir- aŭ virin-estulo. Pro tio ne ekzistas multe da “senkondiĉa amo” en tiu regno, ĝuste kiel devas esti laŭ la spiralcikla evoluo. Ni terhomoj komencas ekhavi ekvilibron inter niaj polusoj. Pro tio viroj iĝas malpli kaj malpli virecaj kaj virinoj malpli kaj malpli virinecaj, vivon post vivo. Kiam “viro” aŭ “virino” estas pli-malpli dupolusa, t.e. havas siajn du polusojn en ekvilibro, li aŭ ŝi sentas amon al la “homo” en ĉiuj homoj sendepende de la sekso.

Kiam viro estas unupolusa, t.e. lia maskla poluso estas klare pli granda ol lia femala poluso, li kutime povas senti amon nur al virino kaj siaj eventualaj infanoj. Kiam virino estas unupolusa, t.e. ŝia femala poluso estas klare pli granda ol ŝia maskla, ŝi kutime povas senti amon nur al viro kaj siaj eventualaj infanoj. Samseksemo, kia ĝi estas ĉi tie sur la tero, ofte venas de tio ke la mala poluso, t.e. la maskla en virino kaj la femala en viro, “vekiĝis” iom tro frue en la evoluo. Pro tio ekzistas “kondiĉa amo” ankaŭ en samseksaj rilatoj. Vere senkondiĉa amo venas de tio ke la du polusoj jam estas preskaŭ en plena ekvilibro. Martinus multe skribas pri amo kaj niaj du polusoj en siaj libroj, aparte en la kvina volumo de *Livets Bog*.

### **Ni survojas al nova mondo**

Laŭ la analizoj de Martinus ni ĉiuj, iom post iom evoluas – vivon post vivo. Daŭre la plejmulto de la homaro apartenas al la tiel nomataj “kaproj” kiuj opinias ekzemple ke oni devas havi fortan nacian armeon por defendi la patrujon. La “kaproj” malofte povas aŭ volas “alturni la alian vangon” kiam ili spertas ian “baton” kaj ankaŭ ne “pardoni sep oble sepdek fojojn” ĉiutage. Sed la suferoj kiujn ni spertas en la fizika mondo gvidas nin ĉiujn antaŭen kaj la “kaproj” iom post iom “ŝafiĝas”, t.e.

fariĝas homoj kiuj ne plu volas militon, militan defendadon, ne plu volas mortigi aŭ vundi aliajn homojn aŭ bestojn kaj kiuj ne koleriĝas sed ĉiam provas esti trankvilaj kaj pacaj. Kiam en la mondo la plejmulto estos “ŝafoj” (t.e. plene pacemaj homoj), aŭ almenaŭ plej multaj ĝenerale havos “ŝafan” sintenon kaj agdirekton, tiam finfine stabila paco ekkreskos en la mondo.

Martinus priskribas ke en tiu nova mondo unuopaj nacioj ne havos potencon armeon, sed ekzistos demokratie stirata mondpolico potenca kiu povos interveni kaj trankviligi eventualajn armilajn konfliktojn. Ne plu estos malsategoj, ĉiuj homoj havas subtenon de la ŝtato, ĉiuj kontribuas per laboro necesa. Senlaboreco ne plu ekzistos en la mondo, sed ĉiuj taskoj estos dividataj en taŭga maniero, tiel ke sufiĉos labori kelkajn horojn ĉiusemajne, laŭ taksoj de Martinus. Tamen multaj volos labori multe pli, simple ĉar ili ŝatas sian laboron. Mono ne plu ekzistos en la mondo, sed per persona “laborkvitanco” eblos vojaĝi kaj aĉeti tion kion oni volas. La bestoj estos protektitaj kaj ne ekzistos viandomanĝado plu. La vivo estos agrabla por ĉiuj. Ĉiuj homoj kiuj ankoraŭ estas danĝeraj por sia ĉirkaŭaĵo vivos en apartaj lokoj kie ekzistos ĉiu necesa subteno kaj diversaj sportejoj kaj amuzejoj.

En la estonteco ekzistos multaj amuzaj, distrajoj, inspiraj komunaĵoj, belaj parkoj, altnivelaj artaĵoj, multe da senkondiĉa amo, amikeco tutmonda, stabila paco, eblo por ĉiuj okupiĝi pri siaj hobiaj, diversstilaj edukejoj kaj lernejoj, granda helpo por ĉiuj kiuj bezonas ian subtenon, ekzemple maljunuloj kaj infanoj. Entute estos multege pli da sano, harmonio, inspiro kaj feliĉo en la paca kaj internaciema homaro, se la analizoj kaj antaŭdiroj de Martinus estas ĝustaj.

## **Estonta mondregno kun mondlingvo, mondbildo kaj mondŝtato**

Dum la venontaj jarcentoj evoluos nova paca mondregno, almenaŭ Martinus antaŭvidis la evoluon de la homaro tiel. En tiu estonta mondregno la jenaj tri aferoj havos gravan rolon: *komuna mondlingvo, komuna mondbildo kaj komuna mondŝtato*. La komuna mondlingvo probable estos Esperanto, se ne aperos iu pli taŭga alternativo en la estonteco. Jen kiel Martinus skribas pri mondlingvo internacia en la libro *La Eterna Mondbildo 2*:

“Estas nature kaj klare, ke en la monda ŝtato aŭ internacia monda regno oni ne lame iros per naciaj lingvaj lambastonoj, per interpretistoj kaj pli aŭ malpli malbonaj tradukoj. La monda ŝtato kompreneble havos sian propran specialan internacian lingvon. Ĉiu unuopa infano en la lernejoj en la tuta mondo ricevos edukon en tiu internacia lingvo de la monda ŝtato. Imagu kia faciliĝo estos por la homoj de tiu tempo tute ne havi lingvajn barojn, senkonsidere kie ajn ili troviĝos sur la tero. Ĉiuj homoj en la mondo, de la sudo kaj la nordo, de la oriento kaj la okcidento, povos interparoli, povos interkompreniĝi. Per komuna lingvo la tuta mondo estos komuna patrolando por ĉiuj homoj sendepende de nacieco, kulturo kaj raso. Imagu kia faciliĝo aŭ laborŝparo, ke ne necesos traduki iajn ajn librojn aŭ skribaĵojn. Ĉiuj povos legi ĉion. Ke neniu el la ekzistantaj naciaj lingvoj estos uzata kiel tiu komuna lingvo, tio kompreneble estas tute certa. Neniu ajn el tiuj naciaj lingvoj estus uzebla sen eventuala estiĝo de ĵaluzo aŭ amaro, eble eĉ ankaŭ milito. Tial la mondo havos neŭtralan internacian lingvon. Kiam oni komencos instrui ĝin en ĉiuj lernejoj de la mondo, la infanoj, kiuj lernos ĝin, atingos la kapablon interparoli sendepende de nacieco kaj

raso. Tio kontribuos al multe pli granda unuigo de la homoj en amikeco kaj paco, kaj daŭre pli altgrade faros ilin interligita frata popolo en la tuta mondo.” (Parto 26.25)

La komuna mondbildo estos laŭ Martinus bazita je kaj la fizikaj sciencoj kaj la spirita aŭ kosma scienco kiun li prezentis. Jen alia citaĵo el la libro *La Eterna Mondbildo*:

“La tasko de la materia scienco estas ebligi al la homo regi la materion, regi la grandiozajn fortojn de la naturo cele al vivo, kiu ne estas bazita sur milito, sur kripligado, sur detruaj mortigoj aŭ inferaj maŝinoj. La materia scienco havas la mision krei maŝinojn, aparatojn kaj ilojn, kiuj povas pli aŭ malpli liberigi la homojn de la kruda laboro aŭ la tiel nomata “malbeno de la peko”: “En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝos panon” (Gen. 3.19). Krome tiu scienco havas la taskon levi per siaj scio kaj spertoj la homaron el la materiaj nescio kaj primitivo al la plej alta scio pri la materio mem aŭ materia mondo. Tiu mondo fariĝis provizora kosma vivspaco aŭ loĝloko por la homaro. Nur kiam la materia scienco estos regata de la vivscienco aŭ kosma konscio, ĝi tute plenumos sian kosman destinon. Tiam finrezulte la kreado, scio kaj povo de la materia scienco fariĝos ekskluzive ĝojo kaj beno por vivaj estuloj, same kiel estas la kreado de Dio (la kreoprocesoj de la naturo). La materia scienco do ne povas doni la solvon de la vivmistero, kaj sekve ankaŭ ne povas esti la vojo al la lumo. Nur kosma konscio, kiun la Biblio nomas “la sankta spirito” (Joh. 14.26), povas solvi la vivmisteron kaj montri al la homaro la sencon de la vivo. Sed kiel menciite, kosma konscio estas perceptebla nur per “la intuicikapablo”, kiu ja dependas de la evoluo de la estulo en humaneco aŭ proksimula amo. Tial tiu evoluo estas la absolute sola vojo al la lumo. Kristo pravas. Oni

devas ami Dion super ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem (Mat. 22.37-39). Tio estas la plenumado de la leĝo (Rom. 13.10) aŭ la vojo al la ĉielo.” (Parto 4.6 en *La Eterna Mondbildo* 1)

Pri estonta komuna mondregistaro Martinus skribis en *Livets Bog*:

“Ĉiuj nuntempaj formoj de evoluo en la tuta tera homaro rezultigos do internacian administran potencon aŭ mondregistaron. Sed surbaze de la jam nun ekzistantaj konceptoj pri justo en la tera homaro tiu registaro ne povas evolui al ia ajn formo de diktaturo aŭ aŭtokratio kaj tiel ne povas aperi kiel novigita aŭ plifortigita formo de la malnovaj aŭtokrataj dinastioj, kie la popolo estis posedaĵo de reganto. La monda tribunalo fariĝos posedaĵo de la popoloj, kio do en tiu kazo signifas serviston de la popoloj. Ĝiaj praktikantoj kaj reprezentantoj estos elektitaj de la popoloj mem kaj sekve povos konservi siajn poziciojn nur pro kvalifikoj konformaj al la deziroj de la popoloj kaj en harmonio kun tiuj konceptoj pri justo kaj moralo, per kiuj la nova mondimpulso nuntempe riĉigas la mondon. Tiu internacia mondregistaro estos la sola fundamento aŭ tiu bazo, sur kiu eblas konstrui “la veran homregnon”. Sole nur de tiu internacia mondregistaro kaj ne de ia ajn formo de nacia tribunalo aŭ ŝtata potenco povas eliri daŭra paco.” (*Livets Bog* 1, parto 103)

### **Ĉu eblas kaj indas prepariĝi por la nova mondo jam nun?**

Laŭ Martinus, jes! Jen citaĵo el *Livets Bog* 5:

“... la tempo venis nun por ĉiuj moderne pensantaj, intelektaj homoj ekkompreni, ke la mondpaco ne estas io, kio kreiĝas ekstere de ilia propra interno fare de mondpolitikistoj, tiel ke ili mem nur bezonas sidiĝi kaj atendi, ĝis tiuj estuloj unu tagon estos solvintaj la problemon. Nepras forte rekomendi al

tia estulo forlasi tiun ĉi iluzion opinion pri la propra situacio. Necesas komprenigi al ĝi, ke la vera paco senescepte estas io, kion krei eblas nur en la propra interno fare de la estulo mem. Samgrade kiel tiu ĉi interno estas purigita de bestaj tendencoj, alivorte: egoismaj principoj, samgrade la estulo fariĝis ĉelo de la mondopaco. Ĉar la mondopaco estas unuo, kiu senescepte povas esti konstruita kaj bazita nur de ĉeloj kies menso aŭ interno de ĉiu unuopa estulo estas absoluta paco, malegoismo aŭ proksimula amo. La homaro ne povas atendi iun veran pacon, tiel longe kiel ĝi konsistas el unuo de ĉeloj (unuopaj individuoj), kiuj en si mem pli aŭ malpli estas “militĉeloj” kaj pro tio samgrade estas malpac-centroj, ĝenantoj de la bonfarto kaj normala feliĉo de siaj proksimuloj.” (*Livets Bog* 5, parto 1733)

Do, vera paco kaj harmonio estas kreebla sole de amemaj paculoj, kaj tiuj pacokreantoj estos iam ni mem! Krome ne indas atendi ke unue ĉiuj aliaj fariĝu veraj paculoj, ni povas komenci nian trejnadon ĉi-kampe jam nun. Gravus provi pensi pri “paco en mi mem” en la ĉiutago, ĉar ĝuste ĝi estas nia trejnejo! Tamen, ne facilas tuj esti tute pacema en ĉiuj situacioj... Certe longdaŭra trejnado kaj praktikado estas bezonataj, kiel ĉiam, por fariĝi majstro aŭ spertulo pri iu nova kampo. Jen ankoraŭ unu interesa citaĵo el *Livets Bog*:

“Ke la terhomoj ankoraŭ ne pli longe venis en la evoluo, ol ke ili grandparte sentas maltoleremon kaj malemon unu kontraŭ aliaj reciproke, aŭ materie aŭ religie, tion montras la ĉiutago per grandega klareco. Kaj ĝuste pro tio ĉi, estas eĉ pli granda bezono, ke tiuj estuloj, kiuj deziras partopreni en la gvidado de la mondo antaŭen al pli lumaj statoj, tiuj estuloj, kiuj reprezentos la novan mondimpulson, ĝuste en tre granda mezuro povas praktiki

toleremon kaj komprenemon.” (*Livets Bog* 1, parto 167)

Resume: ekzerci sin pri toleremo, komprenemo kaj amemo ĉiutage estas la plej grava kampo por ĉiuj kiuj sopiras al nova mondo en paco kaj harmonio. Gravega kaj ankaŭ grandega kampo ne tre facila...

### **Konkretaj konsiloj rilate la estontecon**

Nun sekvos kelkaj konkretaj konsiloj pri kampoj gravaj por la estonteco kie eblas sin trejni kaj ŝanĝi sian konduton iom post iom se oni volas.

#### **Konsilo 1 – Konscii pri siaj pensoj kaj provi igi ilin pozitivaj**

Kiam niaj pensoj estas pozitivaj, optimismaj, trankvilaj kaj helaj, ili fortigas nian sanostaton. Kaj male, malhelaj, netoleremaj, malpacecaj kaj negativaj pensoj malfortigas nian bonfarton kaj sanostaton longperspektive. En la tre interesa libro “Tien” de Claude Piron estas priskribita paralela mondo en kiu vivas homoj kiuj ĉiam provas “nutri sin per pozitivaj pensoj”. Ĉe ili *dankemo* kaj *espero* estas tute esencaj por altigi sian bonfarton. Se oni trankvile analizas sian situacion, oni kutime povas trovi multon bonan kiu povas krei en ni senton de dankemo se ni atentus kaj konscias pri ili. Eĉ se oni estas malsana aŭ havas iun pezan problemon, oni povus fakte senti dankemon ankaŭ pro tio. Ĉar danke al tiaj spertoj ni evoluas kaj proksimiĝas al pli harmonia vivsituationo. Eblas diri ke la vivo konsistas el “deklivoj” supren (por ekzerci nin) kaj malsupren (por ĝui kaj ripozi). Kiel esperantistoj ni ankaŭ scias ke espero estas grava afero. Ne ĉio venas tuj... Multaj aferoj bezonas longan tempon por povi evolui kaj kreski. Indas ne perdi la esperon nur pro tio ke longe daŭras aŭ ĉar aliaj ne atentus aŭ interesiĝas pri tiuj aferoj kiuj estas tre

karaj kaj gravaj por mi. Miaj pensoj kaj sinteno al la vivo – jen mia laborkampoj! Kion aliaj pensas kaj faras, tio estas afero inter ili kaj Dio en kiun vi ne devas tro enmiksiĝi. Do, provu koncentriĝi je viaj pensoj kaj igi ilin pozitivaj, dankemaj kaj esperplenaj. Ne ĉiam facilas! Kelkfoje doloras! Sed tamen, iom post iom dankemo pri malgrandaj kaj grandaj aferoj povas krei en ni pozitivan pensadon kaj esperon.

### **Konsilo 2 – Komprena sinteno al okazaĵoj en la mondo**

Militoj, malsatego kaj diversaj katastrofoj preskaŭ tutan tempon ekzistas sur la tero. Multegaj homoj profunde suferas jaron post jaro. Teruraj aferoj! Treege malagrablaj okazaĵoj! Tamen, el plurviva vidpunkto, ili estas tute necesaj kaj eĉ helpaj al la “viktimoj” longperspektive kaj do iasence bonaj... Sen la “mallumo” ni ne povus renovigi nian konscion kaj atingi la “lumon” denove! Sen la “mallumo” la vivo fakte ne povus ekzisti, laŭ Martinus. Sen suferoj neniu evoluo en la mondo. Do, kiam oni aŭdas pri terura okazaĵo en la mondo, bonas pensi pri la homoj trafitaj aŭ influitaj de la okazaĵo kaj preĝe sendi pozitivajn fortojn al ili. Ankaŭ bonas konscii pri tio ke la terura okazaĵo estas parto de tre longdaŭra plano kaj ke ĝi el plurviva vidpunkto helpas al homoj fari grandan paŝon antaŭen en sia evoluo. Se unu lando atakas alian landon milite, indas memori ke temas pri malluma karmo kiu revenas al la atakata popolo. Ankaŭ indas memori ke tiu milito estas “stirata” de la Providenco (altevoluintaj estuloj en la spirita mondo) kaj ĉiam estas “sub kontrolo”. Do, kial kritiki tion kio okazas en la mondo? Tio signifus kritiki “la grandan dian planon” pri la homaro. Ĝin ni tute ne povas influi. Pli bonas provi kunlabori pri ĝi, t.e. fari ĉion eblan por ŝanĝi nian propran karakteron kaj nian sintenon al la

vivo, interalie al la konfliktoj kaj aliaj malagrablaĵoj en la mondo. Tamen, tio ne ĉiam estas facile!

### **Konsilo 3 – Komprena sinteno al okazaĵoj al ni mem**

Jen verŝajne nia plej granda kaj grava laborkampoj en nia tera vivo! Martinus skribis:

“Simile kiel eblas por estulo per kutima spegulo vidi fizikan bildon de si mem, tiel ankaŭ eblas por estulo, per la kunmetita influo, tiu de la naturo, nome: la ĉirkaŭaĵo kaj la kunestuloj, vidi mensan spegulbildon de si mem. Simile kiel estulo en kutima spegulbildo interalie povas vidi la purecon kaj malpurecon de sia vizaĝo, ĝiajn perfektecojn kaj malperfektecojn, tiel la estulo ankaŭ en la menciita spegulo, iom post iom, povas atingi vidi la purecon kaj malpurecon de sia spirito, ĝiajn perfektecojn kaj malperfektecojn. Same kiel la fizika spegulbildo kreiĝas de rebrilo de la lumo, tiel kreiĝas ĝia spiritobildo de rebrilo de la kaŭzo- kaj efikleĝo.” [Livets Bog 6, parto 2128]

Tre gravas konscii pri tio ĉi kiam oni renkontas ion ĝenan aŭ malagrablan (ankaŭ ion agrablan) en sia vivo. Do, kvazaŭ havi kiel “mantron” estas miaj propraj agoj kiuj revenas, kaj eblas lerni ion de tiuj. Observante sian ĉiutagan sorton oni povas observi sian propran spiriton, t.e. la “purajn” (homajn) trajtojn kaj la “malpurajn” (bestajn, egoismajn) trajtojn en sia personeco. Konscii pri tio ke la okazaĵoj kiuj “trafas” nin estas niaj propraj agoj kiuj revenas al ni, tio povas helpi al ni por pli facile kompreni kaj kunlabori kun nia ĉirkaŭaĵo kaj ankaŭ pli bone ekkoni niajn trajtojn. Poste sekvas la kutime ne tre facila lukto liberiĝi de siaj liberiĝindaj trajtoj...

Aliaj pensoj kiuj povas helpi nin esti en harmonio kaj resti pacemaj estas la diraĵoj: “ĉiuj agas laŭ siaj travivaĵoj”

kaj “*neniu povas suferi maljuste kaj neniŭ povas agi maljuste*”. Tio signifas ke aliaj neniam agas malĝuste, konsiderante iliajn fonojn kaj ke ni mem ĉiam ricevas niajn proprajn agojn kaj pro tio neniam povas suferi maljuste sendepende ĉu sentiĝas tiel aŭ ne. Tamen, gravas memori ke ĉi tiel estas analizante la vivon el kosma aŭ eterna vidpunkto. Ne estas facile havi tiun rigardon ĉiam en sia ĉiutago... Sed se nia sinteno al okazaĵoj kiuj “trafas” nin iom post iom ŝanĝiĝas kaj proksimiĝas al “la spegula pensmaniero”, ni pli aŭ malpli frue atingos pli da pardonemo kaj harmonio en nia vivo!

#### **Konsilo 4 – Pardonado kaj denove pardonado**

Martinus tre ofte revenas al la dirado de Jesuo pri kiom da fojoj pardoni dum unu tago: “*ne ĝis sep fojoj, sed ĝis sepdek oble sep fojoj*”. Laŭ Martinus tio signifas ke oni provu pardoni ĉion! Jen grandega ekzercokampo, ĉu ne? Kio ajn okazas, oni prefere estu preta pardoni aliajn kaj ankaŭ sin mem, ĉar ĉiuj agas laŭ siaj antaŭaj spertoj kaj krome ĉio kio okazas ja estas karmo. Alia tre grava citaĵo de Jesuo estas la fama “*al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, alturnu ankaŭ la alian*” kaj ĝin Martinus klarigas tiel ke kiam iu rilatas al ni per kolero aŭ agresemo aŭ simile, do per besteca trajto, tiam ni provu respondi per komprenemo, toleremo kaj amo, do per homeca trajto. El unu vidpunkto estas nia plej grava laborkampo tiu ĉi – ĉiam provi pardoni kaj agi tolereme kaj pace sendepende de tio kio okazas al ni. Sed gravas memori pardoni ankaŭ sin mem kaze ke oni kelkfoje ne plene sukcesas ĉi-kampe. Multe da ekzercado indas, antaŭ ol oni atingas majstrecon!

#### **Konsilo 5 – Ŝanĝi al tute sanigaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj**

Laŭ la analizoj de Martinus gravas iom post iom ĉesi manĝi viandon, se oni ne jam faris tion. Esti parto de buĉado de miloj da bestoj neniel estas “paca agado” kaj viandomanĝado kreas malluman karmon pro tio ke multegaj bestoj suferas kaj mortas kadre de la viandoindustrio. Malluma karmo pro viandomanĝado povas kolektiĝi dum pluraj vivoj kaj poste realiĝi en ekzemple trafikakcidento aŭ malagrablaj militspertoj aŭ severa malsano. Tia malluma karmo igas la viandomanĝanton ĉiufoje pli kaj pli sentema rilate al suferado de aliaj estuloj kaj faros ke li aŭ ŝi iam (eble en sekvonta vivo) ne plu volas manĝi viandon pro moralaj kialoj.

Ankaŭ fromaĝojn, ovojn, lakton ks necesos iam forlasi por ne esti parto de la grandskala besto-bred-industrio. La malluma karmo pro la manĝado de tiaj produktoj verŝajne ne estas same “peza” kiel de viandomanĝado, aparte se tiuj produktoj estas ekologie faritaj. Tamen, iom post iom bonas proksimiĝi al tutvegana nutrado. La plej bona manĝo por niaj korpoj povas vari, sed ĝenerale estas tiel ke diversspecaj fruktoj kaj legomoj estas la plej taŭgaj, laŭ tio kion Martinus skribas i.a. en la libreto “La ideala nutraĵo”.

Rilate al trinkado gravas eviti alkoholon en ajna formo, ĉar ĝi malbone influas ne nur nian cerbon sed ankaŭ nian spiritan strukturon, klarigas Martinus. Multe da kafe aŭ nigra teo ankaŭ ne bonas por ni ĉar tio povas malfortigi korpajn organojn longperspektive. Povas esti tre malfacile ĉesi trinki alkoholon kaj iĝi vegetarano pro sociaj kialoj, sed se oni vere volas oni certe provu. Tamen, Martinus konsilas ne fari tro grandajn ŝanĝojn abrupte, pro la organoj kaj mikroestuloj en nia korpo, sed iom post iom kaj laŭgrade.

Kion ni “metas” en nian korpon multe influas nian organismon, ne nur la fizikan sed ankaŭ la spiritan flankon. Longdaŭra malĝusta manĝado aŭ trinkado aŭ uzado de drogoj povas severe detruji nian kapablon krei plenfunkciantan korpon en venonta vivo. Sed el plurviva vidpunkto ankaŭ tiuj spertoj estas utilaj kaj pro tio bonaj (kvankam malagrablaj) por ni. Ni ja havas liberan volon mem elekti kion meti en nian korpon kaj poste lernos el la konsekvencoj de tio. Ene de kelkaj jarcentoj verŝajne granda plejmulto de la homaro estos vegetaranoj aŭ veganoj.

### **Konsilo 6 – Lerni uzi preĝadon**

Estante homo sur la tero kun ankoraŭ bestecaj trajtoj en nia konscio kaj trairente relative koncentritan evoluon (dum kiu multaj ŝanĝoj kaj malagrablaj aferoj okazas) ni ĉiuj spertas diversajn malfacilaĵojn. Eble temas pri malsano, aŭ pri senlaboreco, aŭ pri tro da laboro kaj streĉeco, aŭ pri granda soleco, aŭ pri tro da aktivaĵoj, aŭ pri seksaj perfortoj, aŭ pri manko de seksumado, aŭ pri “malfeliĉa amo”, aŭ pri doloriga divorco, aŭ pri alkoholproblemo, aŭ pri konfliktoj kun kolegoj, aŭ pro milito proksima, aŭ pri malsato, aŭ pri bezono tromanĝi, aŭ pri dormoproblemoj aŭ... La listo povas esti multe pli longa! Sendepende de nia problemoj, ni povas ricevi helpon kaj subtenon trairi ĝin, diras Martinus. Sed ne temas pri helpo kiu tuj forigas la problemon. Ni ja spertas la problemon por ion lerni de ĝi aŭ por ke ĝi ŝanĝu nian sintenon al la vivo el longa perspektivo. Danke al diversaj problemoj kaj problemegoj ni povis evolui de simihomoj al kulturhomoj kaj ni bezonas trairi ankoraŭ pli da problemoj por iĝi “pretaj homoj” tute amemaj, saĝaj kaj malegoismaj!

Laŭ Martinus oni povas ricevi grandan helpon kaj subtenon trairi siajn problemojn uzante internan preĝadon

kaj oni ankaŭ povas ricevi helpon estonte eviti problemon. Ne temas pri komuna preĝado, tion multaj modernaj homoj ne plu volas fari ĉar ili jam forlasis la religian sferon en la nuna aŭ antaŭa vivo. Martinus rekomendas personan kaj “internan” preĝadon en si mem. Ankaŭ tio povas esti malfacila por “nekredanto”. Tamen, ne gravas ĉu oni kredas aŭ ne, klarigas Martinus. Petante al Dio pri helpo trairi iun problemon aŭ fari la ĝustan agadon en aparta situacio, oni vokas atenton de la tiel nomataj “gardanĝeloj” kiuj povas doni subtenon al la petanto per spiritaĵ fortoj. Do, la preĝo funkcias kiel “subtenilo” kaj “gvidilo” kaj ne kiel “forigilo” de karmo. Do, bonas ĉiam aldoni laste de sia pensaro al-anĝelara (alivorte, sia preĝo) la vortojn: *“Plenumiĝu ne mia, sed via volo!”*, ĝuste por montri la sintenon ke la “alta morala Forto” (por uzi vortojn de Zamenhof) scias plej bone kion mi trairu kaj spertu por povi plui en la evoluo. Forigado de ĉiu mia malhela karmo ne helpus al mi en longa perspektivo, ĉar tiel mi ne povus plui en la evoluo! En sia libreto “La mistero de la preĝo” Martinus klarigas pli pri kiel uzi preĝadon en sia ĉiutago kaj la kosman interpreton de “Patro Nia”.

### **Konsilo 7 – Provi senti amon al ĉiuj**

Iom post iom ni atingu staton en kiu ni amas ĉiujn. Oni ne amu la malbonajn agojn de aliaj, sed oni tamen povas ami la estulon malantaŭ la agoj, ĉar oni vidas ke ĉiuj agas laŭ siaj antaŭaj travivaĵoj kaj ke ĉiuj estas sur sia evoluŝtupo survoje al proksimiĝo de “perfekteco”. Tamen por atingi “perfektecon” oni ja devas trairi multajn “nematurajn” stadiojn, tiel funkcias la vivo sendepende ĉu temas pri maturiĝanta frukto aŭ maturiĝanta homo! Kiam homo atingas, danke al travivaĵoj lumaj kaj mallumaj dum multaj vivoj, evoluŝtupon sur kiu ŝi ekkonscias pri



siaj propraj mankoj kaj krome ekhavas fortan deziron liberiĝi de tiuj mankoj, tiam tiu persono estas malfermita al konsiloj kaj klarigoj pri la spirita vivo kaj ankaŭ estas preta ekzerci sin mem pri paco, harmonio kaj amo al sia ĉirkaŭaĵo. Tiu ekzercado certe ne estas tute facila! Ni dum jarmiloj praktikis egoisman agadon por protekti nin mem kaj nian familion, kiel bestoj kaj primitivaj homoj tio ja estis io bona, sed nun estas tempo ŝanĝi tiun konduton kaj ŝanĝi sian sintenon al aliaj, si mem kaj la vivo.

### **Konsilo 8 – Studi la trian testamenton**

Se oni sentas inspiron pri la analizo de Martinus, tiuokaze estas bona ideo studi ilin regule. En tiu maniero oni trejnas sian pensadon por iom post iom alkutimiĝi al “kosma pensado”. Temas pri tre longdaŭra trejnado! Estas neniu streso, ni ja estas eternaj estuloj. Tamen, por liberiĝi de bestecaj trajtoj tre gravas havi bonan teorian komprenon pri la mondo, sian propran strukturon kaj pri principoj kaj leĝoj eksterfizikaj. Ĝuste tion donas la tria testamento.

Siatempe Jesuo klarigis al siaj disĉiploj: *“Mi ankoraŭ havas multon por diri al vi, sed vi ne povas tion nun porti.”* kaj *“La Parakleto, la sankta spirito, kiun devas sendi la Patro en mia nomo, devas instrui al vi ĉiujn aferojn, kaj memoriĝi vin pri ĉio kion mi diris al vi.”* – Martinus opinias ke lia verkaro estas la Parakleto, ĉar ĝi donas multajn klarigojn al diraĵoj de Jesuo kaj aliaj aferoj en la biblio. Studante la analizojn en la tria testamento oni aktivigas ĝis nun ne multe uzatan parton de sia cerbo. En la estonteco tiu parto portos la kosman konscion, laŭ Martinus. La plej grava celo de la tria testamento estas ŝanĝi la agmanieron de si mem en longa perspektivo. Regula studado de la analizo de Martinus povas instigi

la studenton provi esti pli pacema kaj amema al sia ĉirkaŭaĵo. Sed same kiel violonludanto bezonas tre longan tempon (kutime plurajn vivojn) por atingi perfektecon en sia ludado, studento de la kosma mondbildo bezonas tre longan tempon kaj multege da praktikado (plej probable dum pluraj vivoj) por atingi perfektecon en sia vivmaniero.

### **Konsilo 9 – Helpi al Esperanto**

Ĉar vi legas tion ĉi, vi jam lernis la lingvon de espero J. Iom post iom verŝajne pli kaj pli da homoj sentos emon lerni Esperanton, sed ne estus bone se iuj sentus premon lerni la lingvon kontraŭ sia volo! Ni fidu ke la Providenco havas ĉion sub kontrolo kaj ke ĝi scipovas levi la intereson kaj scivolon pri Esperanto kiam la tempo estos ĝusta por tio. Ne indas hasti pri tio ĉi kaj provi trudi la lingvon al aliaj. Tamen, se vi sentas inspiron informi pri Esperanto aŭ instrui la lingvon, certe estas tre bone ke vi faras tion!

### **La sep punktoj de Martinus**

Iam homo demandis al Martinus: *Kiel eblas al iu homo atingi tiun toleremon pri kiu vi parolas? – Multajn homojn mi ne povas toleri, kaj tute ne ami, kaj mi ne komprenas kiamaniere mi povus iam ajn atingi tion.*

Al tiu demando Martinus respondis jene:

*Ami sian proksimulon ne dependas nur de la volo, sed same kiel estas ekzemple por muzika talento, tiu konduto estas bazita sur kunnaskita talento. Ĝi estas rezulto de antaŭa konstanta trejnado aŭ ekzercado eventuale okazinta dum pluraj vivoj. Tiu ekzercado finfine rezultigas kulminon de la talento, kaj tiam la individuo aperas kiel geniulo sur la koncertna kampo.*

*La kreado de tiu morala geni-eco aŭ la perfekta kapablo ami sian*

*proksimulon okazas grandparte aŭtomate per la spertado de suferoj, kaj sekve tie estas ekster kontrolo de la volo. Sed ĉi tie mi mencias kelkajn el la plej gravaj faktoroj en tiu parto de la kreado de la talento, kiu estas submetita al la volo. Surbaze de tiuj faktoroj la individuo povas konscie kunlabori en sia propra kreskado al vera aŭ perfekta manifestado de amo:*

- 1. Forigu la nocion “malamikoj” el via konscio.*
- 2. Neniām kontraŭdiru koleron, kalumnion aŭ aliajn formojn de malgrabloj direktitaj al vi.*
- 3. Neniām mem diru ion malbonan pri iu aŭ io.*
- 4. Estu absolute vera aŭ sincera en ĉiuj rilatoj de la vivo.*
- 5. Estu absolute neinfluebla de flato, laŭdo aŭ riproĉo.*

*6. Neniām kunagu por mortigi, vundi aŭ korpodifekti.*

*7. Neniām forlasu la penson pri tio, kia maniere vi absolute plej bone povas utili al viaj kunestuloj. Tiam vi praktikas la plej altan formon de jogo aŭ plej perfektan trejnadon en tiu parto de la evoluo kiu troviĝas en la regiono de via volo. Kaj en kunligo kun la cetera parto de la prilaboro de via naturo fare de la vivo, tio finfine kondukos vin al la morala genieco, transformas vin al perfekta estulo aŭ “dihomo”.*

Plurfoje ni eraras kaj malsukcesas en nia vivo, sed longperspektive ni iom post iom atingos pli altan paconivelon kaj en ni mem kaj en la mondo. “Paco en mi mem, paco en la mondo!”

Bonan sukceson pri la prepariĝo por la nova tre interesa kaj ĝojplena mondo en la estonteco!

*Deziras, Hokan Lundberg*

## NOTOJ

### Eo-semajnoj en Martinus-Centro en 2017

Inter la 30-a de julio kaj 12-a de aŭgusto 2017 la Esperanto-semajnoj en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Estos prelegoj, studrondoj, konversaciaj rondoj, kaj en la vespero estos distra programo, teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Pli da informoj ĉe [esperanto@martinus.dk](mailto:esperanto@martinus.dk)

### Senpaga esperanto-kosmos

1. Du fojojn jare vi libere povos elŝuti la ret-version de Kosmos en Esperanto ĉe la reta adreso de Martinus-Instituto: [www.martinus.dk](http://www.martinus.dk)

2. Retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni elektronikan version de Eo-Kosmos, se vi sendos vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: [esperanto@martinus.dk](mailto:esperanto@martinus.dk)

## Resumo de simbolo n-ro 23: La preta homo laŭ la bildo de Dio simila al li

La preta homo laŭ la bildo de Dio estas estulo kiu jam trairis la tutan mallumzonon de la spiralciklo, plene supervenkis ĉi tiun zonon kaj nun estas perfekta estulo de la lumo. Ĝia plej granda elradio estas pura ĉioamo, sendepende ĉu ĝi rilatas al kreskaĵo, besto aŭ homo kaj sendepende ĉu estas amiko aŭ malamiko. Ĝi sekve estas en plena kontakto kun la baza tono de la universo, kiu estas amo. Ĝi povas alpreni suferadon kaj doni sian vivon por aliaj.

### Gravaj aferoj en la simbolo:

La malgranda triangulo ĉe la korofiguro simbolas la vivan estulon.

La korofiguro simbolas ke la estulo havas perfektan amokapablon, kaj la kunmetitaj manoj en la korofiguro simbolas ĝian perfektan kapablon pardoni.

La granda orangkolora arko estas malluma sortoarko de la estulo mem elsendita kaj nun revenanta.

La granda flava arko montras ke la homo per granda afableco akceptas la malhelan sortoarkon kaj tiel elsendas luman sortoarkon. Tiu ĉi perfekta maniero akcepti sian malhelan sorton gvidas la estulon el la bestoregno kaj en la veran homregnon.

La granda triangulo simbolas Dion kaj la blanka radianta glorkrono ĉirkaŭ la triangulo simbolas la unuarangan konscion de Dio. La kolorigitaj kampoj ĉirkaŭ la glorkrono simbolas la diversajn estadsferojn de spiralciklo.

La kvinpinta stelo en la radianta glorkrono simbolas la mondliberigadon.

La kristosimila estulo en la triangulo simbolas la pretan homon.

Plej malsupre estas montrita aro da reenkarneigoj de la estulo, kunligitaj per sortoarkoj, kiuj laŭgrade ŝanĝiĝas de la mortiga maniero al la humana.

La apero de la tero el nubokovrilo maldensanta simbolas ke la homaro de la tero kreskos al vivi en regno de amo, en kiu ĉiuj amas ĉiujn.

En *La Eterna Mondbildo 2* legeblas la simbolklarigoj de Martinus.

## INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto  
Mariendalsvej 94-96  
DK-2000 Kopenhago  
Tel: (+45) 3838 0100  
Telefontempo:

lundo-ĵaŭdo 13-16

vendredo: 9-12

DK p.ĝiro 642-9580

www.martinus.dk

esperanto@martinus.dk

shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg  
kaj Ole Therkelsen.

Kompostado: Jan Tarbensen.

La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut  
Redono de teksto nur laŭ skriba  
permeso.

Presita de Martinus Institut  
ISSN 1600 4116.

## Resumo de simbolo n-ro 19: Tra la mallumo de la iniciiĝo (infero aŭ Ragnaroko)

La simbolo temas pri persono kiu trairas la kulminon de la mallumo. Per la kosmaj analizoj ni povas ekvidi la solvon de la mistero de la mallumo kaj de la tiel nomata “malbono”. La mallumo fakte estas dia stadio en la granda iniciiĝo, kiun ĉiuj homoj sur la tero travivu. Sen tiu ĉi stadio la kreado de Dio de la homo al sia simileco estus tute malebla. La kreado okazas sole per tio ke Dio lasas al sia “filo”, la eterna viva estulo, plene trairi la mallumon kaj per tio igi lin genio pri “la malbono” kaj “la bono” en la vivo. La travivado de “la malbono” okazas pro la manko de kosma konscio kaj ĉioamo. La portanta principo en la kulmino de la mallumo estas la mortiga principo. Tiu ĉi principo estas vivtenata per la sento de malamikeco kaj la kredo ke maljusteco ekzistas. El kosma vidpunkto neniu povas agi maljuste aŭ suferi maljuste.

### Gravaj aferoj en la simbolo:

La oranĝkoloraj kampoj malsupre, disigitaj per flavaj kampoj, simbolas vicon de la fizikaj enkarniĝoj de la estulo.

La triangulo kaj la koro estas esprimoj de la mio kaj ties organismo.

La larĝa oranĝkolora arko maldokstre simbolas sortoarkon revenantan, kiu estas la efiko de malluma kaj malbona ago kiun la estulo iam faris kontraŭ sia proksimulo.

La persono, la naturo aŭ la ilo kiu realigas la revenantan malluman sortoarkon estas spertata kiel malamiko aŭ maljusteco. Tio ĉi estas simboligita per la maldekstra glaveto. Tiel longe kiel la estulo ne komprenas ke ĝi mem estas la fonto kaj la kaŭzo de sia sorto, ĝi daŭrigas reagi en mortiga maniero. Tio ĉi estas simboligita per la dekstra



© Martinus Institut 1981

Reg. 19

*Tra la mallumo de la iniciiĝo (infero aŭ Ragnaroko)*

glaveto kaj ankaŭ la oranĝkolora arko kiu iras supren-dekstren. Tiel estas elsendita nova malhela sortoarko, kiu iam revenos al la estulo.

La kranio simbolas la malvarman komprenon de la materialismo, ke la morto estas plena neniigo de la viva estulo.

La fajromaro simbolas militon kaj mizeron.

La vulkano simbolas naturkatastrofojn.

La radianta glorkrono malantaŭ la noktonigra mortoĉielo de la materialismo kaj sendieco esprimas lumon de la plej altaj spiritaj mondoj.

En *La Eterna Mondbildo 2* legeblas la simbolklarigoj de Martinus.